La indiĝenoj, kiuj iam vivis en Tasmanio, laŭiris ŝtupojn de evoluo similajn al tiuj de la Aŭstraliaj, sed inter la du popoloj troviĝas forte malsamaj trajtoj. La Tasmaniaj estis uloj mizeraj, mallonganazaj, krispharaj. Ili kunvivis en grupoj malgrandaj, kaj tiel mallaboremis, ke, farante fajron, ili bruligadis nur du-tri lignopecojn, kaj por estingi aŭ kunigi la pecojn ili uzadis la piedfingrojn. Esploristoj, kiuj frutempe renkontis la indiĝenojn, trovis ilin malatakemaj, bonhumoraj—amikigemaj simpluloj, kiuj havis fortan amon eĉ al siaj skabiaj hundoj. Homoj kaj hundoj dormis kaj manĝis unu kun la alia; la mangaĵoj konsistis plejparte el kanguruoj, didelfoj kaj fiŝoj. La iloj uzitaj estis el ŝtono kaj tiel primitive faritaj, ke multajn oni konsiderus nur kiel kuriozajn ŝtonpecojn. En iuj regionoj (ekz. en la nordo) oni ankoraŭ iafaje trovas restaĵojn (ilojn, iamajn loĝlokojn kaj sim.) de la landidoj. Fakulo A. L. Meston, magistro, trovis proksime de Devonport signojn, kiujn li kredas esti desegnaĵoj fare de la indiĝenoj—tre grava eltrovaĵo, tial ĉar dum longa tempo oni opiniis, ke la desegnoarto

apartenas al pli alta kulturnivelo ol tiu de la Tasmaniaj homoj.

Antaŭ ol elmortis la idoj de l'natura ilia lingvo diserigis en kvar reciproke nekomprenblajn dialektojn, sed oni trovas multon frape belan en tiuj idioj. Okcidente ekzistas loko, kie du riveroj renkontiĝe formas trian. Ĉi tiun lokon la indiĝenoj nomis "Tullah" (nun la nomo de urbeto), signife "Renkontejo de l'akvoj." Ĉu ne poezia?

Kiam la angloj ekloĝigis en Tasmanio, tiam nomata Lando de Van Diemen, ili uzis la insulon kiel malliberejon por krimuloj. Ĉi tiuj, forkurinte, ofte fariĝis banditoj. La indiĝenojn ili mortigis dekope, kun la rezulto, ke ĉi tiuj ekmalamis ĉiujn blankulojn kaj poste reciproke mortigis bedaŭrinde ne nur la banditojn sed ankaŭ honestulojn.

Tiel vasta fariĝis la interhoma buĉado, ke fine per helpo de George Robinson oni persvadis la indiĝenojn elmigri el Tasmanio en apudan insulon (Insulo de Flinders). Tie ili malfortiĝis kaj finfine elmortis; la lasta el la raso estis nomita Truganini—belulino eĉ laŭ kriterio de blankuloj.

Tiel finiĝis tre interesa popolo; sed interesatoj povas ankoraŭ renkonti ĝiajn duonblankajn idojn kaj vidi lokojn, kie ĝi pasloĝis, samsame praaspekte kiel vidis ilin la nigruloj, ĉar ĝis nun multaj regionoj en Tasmanio res-

tas senhomaj kaj en sia primitive sovaĝa stato. (C. C. Cowling.)

Scouting and Esperanto

At the Scout Jamboree to be held at Frankston, Victoria, during the Melbourne Centenary celebrations difficulties are likely to arise in regard to the language question. Few Australian Scouts speak anything but English, so, unless visiting representatives of foreign Scout organisations are able to use that language matters are likely to be at a deadlock. Recognising this, the Melbourne Esperanto Club, as soon as they heard of the Jamboree, approached the Organising Secretary, Major Harcourt. They proposed that local scouts be urged to take up the study of Esperanto and engaged themselves to teach, either direct or by correspondence, any applicants who should present themselves for tuition.

Following an announcement in the local scout paper a good response was received by Mr W. Brentwood, who is handling the affair for the Esperanto Club, and arrangements have been made to provide opportunities for learning the language.

Esperanto groups in countries from which scout visitors may be expected have been notified of Melbourne Club's action and asked to co-operate by pro-

viding facilities for intending visitors to learn the language.

NOTHING EVER HAPPENS NOWADAYS.

Emma Osmond.

A few days later, in a small town in Carinthia, we noticed that a man was following us. Where we stopped, he stopped, and at last we decided to return to the hotel. A teacher had offered to show us round the neighbourhood, on Sunday morning, but as a heavy storm of thunder and hail came on, he proposed a visit to the Museum. To our surprise, the same young man followed us in; he had evidently been waiting outside the hotel. But this time he came up to our guide, and began speaking in Esperanto to him. On being introduced to him, we found out why he had been shadowing us. He had heard our Esperanto and seeing that we were foreigners, wished to talk to us, but was too shy, till he saw us with a member of his group. In the evening, we wandered into the principal hotel to hear the concert, where we saw an Esperanto flag on one table, and an English lady sitting near by, waiting to see if any Esperantists would appear, as she was travelling alone. I had read and used her Esperanto grammar-book, but I had never met her before. During the evening, about twenty local Esperantists appeared, some of whom made arrangements to meet us each day to show us the beauty spots of the neighbourhood.

On our way home from Austria, we again had the good fortune to meet a helpful Esperantist. We had always heard that Austria was a small country, so we imagined that a few hours would bring us to the frontier. We stayed till the last day allowed by our Esperanto-congress ticket. We were surprised to find that the mountainous nature of the country made the journey much longer than we had expected, and after our time-limit had expired we had to explain why we were travelling in a train with a ticket which did not entitle us to do so. The puzzled query of the inspector was explained to us by an Italian who understood German and Esperanto. He took our

tickets and showed them to the inspector, asking, "Do you mean to say that you know nothing about the Esperanto Congress in Vienna, which 3400 people attended? I heard of it in Italy. Well, these wellborn ladies are travelling home from it." The astonished inspector did not know how to answer this attack, and disappeared. So after we had parted from our kind Italian, whenever anyone looked puzzled about our tickets, we looked as important as we could, and presented our Congress-tickets, saying with an air of decision, "Esperanto-Congress." By means of this talismanic pronouncement we succeeded in getting to the Swiss frontier without further trouble.

One more instance—In 1915, I was waiting on the platform at Narbonne station for a train to Barcelona, and feeling rather nervous about how we should pass the frontier, as neither of us knew any Spanish. Just then there was a strict police supervision. When the Paris train came in, we heard our names called, and to our pleasure found a Catalan friend with a German Esperantist on their way to Barcelona from the Paris Exhibition. At the frontier we had no difficulty at all, and although we stayed some time in Spain, as our friend guaranteed our harmlessness, we did not even have to register with the police. On the journey, our time passed pleasantly in learning the numbers and some Catalan phrases in everyday use, and in witnessing a vigorous discussion between the Catalan Esperantist and a fellow-traveller on the advantages of Esperanto. They became so energetic, in spite of the heat, that we were afraid that a quarrel was taking place, for we did not know till later the subject of the conversation.

Now about foreign Esperantists in England. One day when I was watching the changing of the guard at Buckingham Palace, I heard a lady asking in French what they were doing. I felt sure my French was not equal to explaining such a very English custom, but when I saw that the gentleman with her was wearing an Esperanto star, I introduced myself and we were soon in conversation. I had two hours to spare, and as the French visitors knew no English they gratefully accepted my offer to show them Whitehall and Westminster Abbey. They were delighted with Dean's

Court and the Cloisters, and prepared to take a photograph, but I showed them a notice forbidding it. The man begged me to go away while he took some, for as he could not read or speak English, that would excuse him. We sat at a little distance, and watched the proceedings, and as no one appeared he got his photographs.

On another occasion, I had left an Esperanto service in a London church and was going with a Dutch lady to a restaurant where a room was open for Esperantists on Sundays. We saw a dark-complexioned man looking up and down the street, and as we approached, he noticed my Esperanto star, pointed to his, and explained that he was trying to find a restaurant. We invited him to tea and introduced him to other Esperantists. When I visited Barcelona, three years after, this Catalan was one of the first persons to greet me.

In Trafalgar Square and in Hyde Park I have also met Esperantists from other countries. My experience has shown me it is unwise to talk unguardedly in Esperanto, for many people understand it. I could give you many more instances of its usefulness, and can assure you that it is the only language which takes away the feeling of being a foreigner in a strange land. No other language opens the homes of people of all nations to you.

(The End)

KORESPONDADO.

Vienano, 21-jara, volas novaĵojn el Aŭstrio, vidaĵkartojn, bildgazetojn. Jozef Brunner, 18 Paulineng. 9, 2, iv, 13. Vieno.

Germano korespondus letere, bildkarte. Respondo certega. R. Goebel, Rabenau b/Dresden.

Hedwig Winkelmann, Herford in Westfalen. Ludwig-Windhorstr., 35, Germ., tre volas interŝanĝi p. markojn.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following: Mr. L. Illingworth, 9/-, December, 35; Brisbane Esp. Society, 12/-, (sales); Mr. W. Holloway, 4/6, Feb., 35; Miss E. Leftley, 4/6, Sept., 34; Mr. F. J. Hills, 4/6, Dec., 34; Mr. Holmes 2/6, Aug., 33; Mr. C. W. Ballard, 4/6, Dec., 34; Mr. Gray, 5/-, (foreign subscription); Coburg Esp Club, 2/6 (sales); Mr. J. Girdwood, 4/6, June, 35; Miss Berthold, 5/-, Dec., 34; Mrs Hanks, 4/6, Sept., 34; Miss Beswick, 4/6, Oct., 34; Rev. Lambton, 4/6.

KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—Efika instruado kaj eduka distro, jen la ĉefpunktoj de la ĉiusemajnaj kunvenoj, kiuj daŭradis sub la prezido de s-ro V. Leck de post 30/1/34. Ni decidis organizi specialan programon unufoje ĉiumonate. La unua aranĝita de f-ino C. Smythson, okazis la 28 Feb-o kaj portis bonan rezulton: pli da intereso en la programoj. Alia sekvas 20/3/34.

Bedaŭrinde por la klubo, s-ino C. Leck, klubfondintino, forlasis en Februaro por viziti Italujon. Ekipita per Esp-o, ŝi sendube trovos la vojon pli facila kaj sian viziton en fremdlandoj pli gajiga. Ge-sroj J. A. Brailsford, el Wanganui, adiaŭis Nov-Zelandon 2/3/34. Ili forvojaĝis el Wellington ĝis Launceston, Tasmanio. S-ro Farnell, malnova samideano brita mallonge vizitis nian urbon samonate, kaj post veturo tra la Suda Insulo revizitis nin. S-ro Tooley, el Christchurch, favoris nin per vizito 6/3/34 kaj kuragigis per raportoj pri aferoj en aliaj N.Z. urboj.

Masterton, N.Z.—Klubagado por 1934 rekomenciĝis 6/2/34, kiam Dro Williams, el Papua, ĉeestis. S-ro Tooley, el Christchurch, partoprenis 20/2/34. Ambaŭ paroladis al ni; kaj tiu ĉi lasta ankaŭ parolis de loka stacio Z2D.

Probable la plej progresiga paŝo ĝisdate prenita de la klubo ĉi-tiea estis utiligi radio-stacion Z2D. Dum la pasintaj du monatoj la klubsekretario, s-ro Franks, brodkastis ĉiumerkrede pri "Esperanto: ĝiaj celoj kaj aspiroj." La brodkastado estas bonega propagandilo, ĉar kelkaj novaj membroj, aŭdinte pri la lingvo por la unua fojo, aperis ĉe la klubo. Enketojn el vasta regiono.

Wanganui, N.Z.—Nova klubo stariĝis ĉi-urbe 28/2/34. Dron F. J. Williams, el Papua, ili elektis kiel honoran prezidanton—komplimento por lia valora laboro por Esp-o ĉe Wanganui kaj en Nov-Zelando dum viziteto. S-ro G. T. Wright (31 Liverpool St.), estas hon. sekretario kaj delegito al loka komitato de la Ligo de Nacioj Unuiĝo de la S-ro S. I. Nolan, malnova E-isto kaj kapabla lingvisto, estas gvidanto. Klubanoj nombras 15, inter kiuj 6 lernejinstruistoj; alia deko promesis ĉeesti sekvan kunvenon. La klubo kunvenas ĉiumerkrede je 7.45a ĉe Trinity Bldgs., Victoria Avenuo (kontraŭ Y.M.C.A.).

Anoncite ankaŭ, ke s-ro E. A. Wat-

kin gvidas nedevigan klason de studentoj ĉe la Wanganui Teknika Kolegio; la lernantoj progresas bonege.

Palmerston North, N.Z.—Danko al s-ro H. E. Facer, NZEA Vic-prez., klubo kun 14 anoj fondiĝis ĉi-urbe 6/3/34, post reklamo en tagĵurnaloj kaj kunveno en la antaŭa semajno, kiam 20 personoj jesis proponon starigi klason. Ni kredas, ke la entrepreno formos solidan bazon por la 6a N.Z. Kongreso ĉi-loke je la jarfino.

Adelaide.—Club has increased its order for Suda. Bravo!

RECENZOJ

La Infanoj de Betlehem. Selma Lagerlof; El la Sveda trad. O. Frode. Eld. de La Eldona Societo Esperanto, Box 698, Stockholm. Paĝoj 32; prezo 3 resp. kuponoj.

La amo radianta de la infano-Kristo fondas la feran koron de Romia soldato, simbolo de militista senindulgo. O. Frode tradukas klare, simple, sed senorname, neniel celante la stilefektecojn. Tiu ĉi manko de originala formkreemo rezultigas ian rigidecon en lia verko, precipe ĉe certaj frazoj, kiuj sin movas iom grinĉe. Leginda fantazieto, kies ĝusta loko estas en volumo de tiaj. Sed kvankam la amasigado de kelkpaĝaj broŝuroj ne tre imponigas le E-an aferon, tiuj similaj al la nuna povas bone servi kiel malkara legaĵo por kursanoj.

Notindaj:—"stamena faruno" (poleno, florpulvo); "la etuloj ne povis majstri (regi) sian scivolemon"; "ĝis kiam," "dum kiam" ("kiam" ne necesas). "Tiel longe kiam (kiel) Herodo scias."

La Esperanto-Klubo, de E. Malmgren. 48 p., sameldoneja, prezo sama.

La progreso de la E-a movado en Svedlando ĉiel estas konstatabla. Konata gvidanto de la tiea movado estas s-ro M., sek-uo de Sveda E. Federacio, kiu per ĉi libroto celas plifortigi la lokajn grupojn. La verko estas uzbla ĉiulande. Temas pri fonda de E. kluboj, aranĝo de la laboro en amuzo kaj samtempe rezultorica maniero. Konsiloj pri taskoj de funkciuloj, modelo de protokolo kaj E. biblioteko, kaj stenografa referato de klubkunveno specimene montras precizan procedon. Fonto de bonaj ideoj por klubaktivuloj.

Komentoj al la Komunista Manifesto; El la angla kompilis A. Veder. P. 56, prezo 4 resp. kuponoj ĉe 23 rue Boyer, Parizo 20. Enhavo: Komentoj al la Kom. Manifesto, de A. Petersen. Antaŭparolo al la Kom. de F. Engels; kaj Cian Potencan al la Socialista Industria Unuiĝo. Plejparte pledo por la doktrinoj de la Usona laborista

gvidanto De Leon kaj la tezoj de la Socialista Laborista Partio de Usono.

Bona lingvaĵo. Note: flaraĉisto (A. pimp); Komunriĉaĵo (A. Commonwealth). La tradukinto eraras skribante Hegs kiel sonimiton de Hughes. Devas ĝi esti Hjuj. Ĉiu povas lerni multon lingve kaj sociolitike pere de ĉi malkara ĉe valora kompiloto.

No. 1 de Biblioteko de la Propagandisto de H. Fischer-Galatz, L.K. Eld. La Esperanto-Centro Rumana, Str. Dr. Istrate 10, Bukareŝto, 2 resp. Kuponoj alvenigos pli ol unu numero.

La enhavo de ĉi tiu "biblioteko" estas tiel interesa kaj altnivele elektita, ke ni preskaŭ koleriĝas kontraŭ la redaktoroj, tial ĉar ili eldonigas en tiom malgranda amplekso. Nepte postulu specimenon.

The Tenth Book of Homer's Odyssey. Trad. en Esperantajn heksametrojn de Giles Dixey. Eld. B.E.A., London. Prezo 1s.

La E-istoj estas popolo plejparte numondpensata, kies okuloj tenas direkton al la estonto. Sed al tiuj malmultaj, kiuj ankoraŭ ŝatas legadon de antikvaj verkoj, ni turnas atenton al la supra libroto. Mi firme opinias, ke D. estus farinta pli kontentigan laboron se li rezignus la metrikon kaj penus pli konservi la sencan de la originalo. Per tio li evitus teruraĵojn, kia:

... Ne drogo ĉi tiu bona, mi kiun provizas, permesos. (Linioj 291-2).

La antaŭparolo asertas, ke s-ro D. tradukis ĉi tian verkon post nur du horoj de sia unua paŝo en E-o. Tiu memfidaĵo incitas min rimarki, ke sole nur la prepara laboro super la propraj nomoj en Homero postulus almenaŭ tiom da tempo ĉe konsciencia studo de la Zamenhofaj kaj Wusteraj provoj, kiujn li tiel supereme ignoris. S-ro D. trovas malfacile, refuti akuzon, ke li iom tre malalte taksis la fortojn necesajn por plenumi la malfacilan taskon, kiun li tro frue entreprenis.—ROBO.

Kristo estis kisata, antaŭ la perfido.

Mi ĵus aŭskultis radie la entronigon ĉe la katedralo Sta. Andreo al la nuna Sidneja ĉefepiskopo kaj metropolitano anglikana de Stato Nov-Sudkimrujo. Bela muziko, dignoplenaj vortprezentadoj, atmosfero de pia soleña spirita grandiozo, elektrecigo kvazaŭ ĉeestis la Eternulo mem. Kaj jen parolis al sia atentokatenita kongregacio la nova majstropastro de Dio: "Ni predikas Jesuon Kriston," kaj aldonis: "Nia devo estas pensadi imperiisme."

Bone! Sed ni memoras, ke la Nova Testamento informas pri certa alia kompatinda imperiulo, la Cezaro mem, ĉi tiu devis permesi, ĉar li devis pensi imperiisme, ke per la tiamaj "leĝaj" rimedoj estu krucumita la Kristo.

Ah ve! Kiom dolora la plej justa "leĝo," kiam ĝi devas anstataŭi la Dian amon. Sajnas, ke jam iuj eltro-

PARALLEL TRANSLATION.

Amo kaj Literaturo.

Estas tre dubinda tio, ke oni povas ĝuste nomi la plej famajn rakontojn de la mondo "amrakontoj". Ili ne estus famaj, se la viroj kaj virinoj en ili ne estus motivataj de tio, kio daŭre impulsas la vivon antaŭen; sed tiuj verkoj ne teme pritraktas la amon. Se ni nur mallonge pripensas la demandon, ni devas konfesi, ke la ambicio kaj la impulso al aventurado progresigis la homaron en multe pli alta grado ol faris tion la seksa impulso. Ĉu pro amo James Watt eltrovis la vapormaŝinon, ni ne scias. Li ne diris, ke jes. Ĝi ne estis virino, kiu pelis Kolumbon al lia serĉvojaĝo al Ameriko. La ideo pri la aeroplano ne ekestigis en litĉambra sceno. Pense pezu la kvanton de pro-ama intereso en La Progreso de la Pilgrimanto, Robinson Kruso, Don Kihoto, La Vojaĝoj de Gulliver, Gargantua kaj Pantagruel, Makbeto, Reĝo Lear, kaj Hamleto, Tristram Shandy, Moby Dick, La Insulo de la Pingvenoj, La Pickwick'a Kroniko, jam ne parolante pri Vojaĝa Fino, kaj En Okcidenta Nenio Nova.

Esperantistoj firme kredas, ke d-ro Zamenhof, dum ke li ellaboris Esperanton, estis puŝata de emociaj pelfortoj, kiujn la plejparto de l'homoj opinias esti tute malsamaj ol la pure seksa motoro. Kiam li elektis tiun majstran romanon, Marta de Orzeszko, li donis al ni ne nur Esperantan tradukon de unu el la plej bonaj pecoj de la Pola literaturo, sed ankaŭ verkon en kiu la amoj de viroj kaj virinoj---amoj cetere ne tre gravaj---nure helpas formi fonon por la centra figuro de la sorte-turmentata vidvino

Love and Literature

"It is very doubtful indeed whether the great stories of the world are "love stories". They would not be great if men and women were not moved in them by what keeps life going on, but love is not their theme. If you consider it for a moment, you must admit that ambition and the urge to adventure have done more for the world than the attraction in sex. Whether James Watt discovered the steam engine through love, we don't know, but he did not say so. It wasn't a woman who drove Columbus to the discovery of America. The idea of the aeroplane did not have its origin in a bedroom scene. Estimate the amount of love interest in "The Pilgrim's Progress," "Robinson Crusoe," "Don Quixote," "Gargantua and Pantagruel," Macbeth, Lear and Hamlet, "Gulliver's Travels," "Tristram Shandy," "Moby Dick," "Penguin Island," "Pickwick Papers," to say nothing of "Journey's End," and All Quiet on the Western Front."

Esperantists firmly believe that Dr. Zamenhof, in elaborating Esperanto, was moved by emotional impulses generally held to be far removed from the purely sexual motive force. By his choosing that masterly novel Orzeszko's "Marta," he gave us not only an Esperanto translation of one of the finest pieces of Polish literature, but also a work in which the loves of men and women, such loves as they are, merely help to form a background to the central figure of the fate-harried widow.

vis bonan rimedon por servi kun tuta animo du mastrojn samtempe. Jam poveblas senhezite sekvi Kriston sur la Ĉiela Vojo, kaj postkuri la flatglorajn terflorojn, bagatelojn, tronojn kaj kronojn de la nuna mondo. Kial la nova ĉefepiskopo ne diris, sed senhipokrite: "Ni ja predikas Jesuon Kriston; jen belsona oportuna religia frazo. Tamen ni praktiku nian imperiisman vojon, ĉar ni naskiĝis britoj por esti filoj de Britujo, kia mi; tute ne por esti filoj de Dio, kia Kristo. Ho jes, ni prediku Jesuon Kriston, sed ni praktiku britan imperiismon?"

Ĉu ne similas certajn scenojn de la Progreso de la Pilgrimanto ĉi tiu bildo de progresvola homaro, funde perdita en la fi-arbaro Naciismo, kiun regas gigantoj vere hommanĝaj?

Willoughby, NSK. —J.E.

Aperos: "Feliĉeco," J. Gray.

Next number 21st May.

What do you think of La S.K.?

Ne forgesu provizi la benzinon!

Melbourne Esperanto Club.—Wednesdays, 8 p.m., Australian Church Hall, Russell-st., Melb. Mr. R. Rawson, 169 Exhibition-st.

Melbourne Esperanto Society.—Tuesdays, 8 p.m., Scots Church Hall, 97 Russell-st., Melb. Secretary, Miss L. Irwin, Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

Coburg Esperanto Club.—Thursdays, 8 p.m., Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Secretary, Mr. A. Spencer, 48 Munro-st., Coburg.

Sydney Esperanto Society.—Thursdays, 8 p.m., 2nd Floor, Manning Bldg., 449 Pitt-st., Sydney. Secretary, Mr. L. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto Society.—2nd and 4th Tuesdays in each month. State Service Union Room, 59a Elizabeth-st. Secretary and president, Mr. L. Parry.

Adelaide Esperanto Club.—Thursdays, 7.45 p.m., Paringa Bldg., Hindley-st., Adelaide. Secretary, Mr. F. Droop, 13 Chatsworth-grove, Toorak Gardens.

Westralian Esperanto Society (Perth).—Meets every week. Secretary, Mr. D. Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth.

New Zealand.

Wellington Esperanto Club.—Tuesdays, 8 p.m., Y.M.C.A., Willis-st., Wellington. Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn.

Masterton Esperanto Club.—Tuesdays, 8 p.m., Y.M.C.A. Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A., 38 Worksop-rd., Masterton.

Auckland Esperanto Society.—Mondays, 7.30 p.m., New Church Hall, Newton-rd. Communications president, Mr. J. Russell, 2 Pukenui-rd., Epsom.

New Zealand Esperanto Association.—Headquarters of the international language movement in New Zealand. Patrons: Sir George Fowlds, C.B.E., Auckland, and Prof. J. Macmillan Brown, Christchurch, Chancellor of the New Zealand University. President, Mr. W. L. Edmanson; Vice-pres., Mr. C. Brandon, Auckland, Mr. H. E. Facer, Palmerston North, Mr. A. Dewar, Masterton, and Mr. L. A. Efford, Christchurch. Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Wellington; Hon. Secretary, Mr. Wm. H. King (Room 106, G.P.O. Bldgs., Wellington, C.I.). Operations: Propagating Esperanto; arranging annual congresses; conduct of correspondence courses; supplying information, etc.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo—12 linioj: 3 ŝilingoj.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 161 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

20 Majo, 1934.

WE AND THE JAPANESE.

Nowadays we all want to read more about Japan, but we must, it is generally held, content ourselves by reading books written by Europeans about Japan, or those very few studies written by Japanese knowing English well enough to set forth their thoughts in that language.

Now it would surely be a great step towards a readier perception, a clearer comprehension, were we able to approach the mind of the Japanese direct, and as set down straight from their pen without the palsyng handicap of unfamiliar language. Every Esperantist can read something of what the Japanese are thinking about the world situation, and of how they are reacting to Western apprehension and criticism of far Eastern happenings. Why not then get it first hand? Not through European spectacles of this tint or that, not through the laboriously composed English of Japanese "polyglots", but through the Esperanto writings of men who have studied the language to rock bottom, and now wish to clarify to the outside world the tendencies of thought and action of modern Nippon. This means is provided by "Oomoto Internacia" published in Kameoka, Kioto-hu. For a mere 4/6 a year one receives 32 pages a month of rea-

ding on such subjects as: Japan and the world; On Japanese Diet; The World against Japan; The Japanese Mandated Islands; Japan and the Dutch; On so-called Japanese Dumping. Valuable through the dearth of good text-books in English is the course of the Japanese language for Esperantists; the fine Esperanto rendering of much of the lesser-known prose of that strange but gifted Anglo-Japanese, Lafcadio Hearn, charms by its form and astounds by its insight, while those interested in the shaping of religious thought will find much worthy of study in the articles born of the decline of traditional Shintoism.

It is something of a reproach that only a few in Australia subscribe to and collaborate with this eminent publication. The Japanese are our next door neighbors; thousands of Esperantists are found among them. The distance to and from Japan is considerably shorter than that to Europe, a fact that should appeal to the correspondent. Yet we maintain our anything but splendid isolation. There was never a time that called more clearly for understanding and cooperation. Equipped as we Esperantists are with the means of answering it, it is our duty and privilege to do so as far as we are able.

DO YOU KNOW THAT:--

Zamenhof streets and places exist in 32 towns of the world?

More than 50 marriages have taken place between Esperantists, each pair of whom spoke different mother tongues?

The first radio talk in Esperanto was on 7th April, 1924, from Paris, PTT?

The famous "Life of Jesus," by Renan, is obtainable in Esperanto?

In France alone more than 500 teachers can speak Esperanto?

There has been an Esperanto World Congress attended by delegates whose costs have been wholly borne by the State?

The first State to declare Esperanto a "clear" telegraphic language was Brazil?

The first wireless conversation was between Senhor Fernandes (Brazil) and M. Houbart (France)?

These facts and thousands of others equally interesting are contained in the great Encyclopedia of Esperanto (Literatura Mondo, Budapest).

THE B. E. S. ADRESARO

for 1934 (11th edition) with addresses of E-istoj of over 40 nations, will soon be to hand. Order now from us.

Price 1/1.

FELICECO: De J. Gray.

Foje en urbeto loĝis tre malofta objekto, nome feliĉa homo. Li estis ŝuflikisto kaj tiel feliĉa, ke li ne konsciis pri sia feliĉeco.

Tiel feliĉa estis li, ke iu sinjoro sciigis pri li kaj alvenis lin. "Ho maljunulo," diris la sinjoro, "diru al mi, pro kio vi estas feliĉa. Por la informo mi donos al vi du orajn funtojn."

Konfuzis la ŝuflikiston la peto. "Mi ĝojas pro tio, ke la suno brilas kaj la birdoj kantas," fine li diris.

"Tio ne povas esti," diris la sinjoro, "Mi ankaŭ vidas la sunon brili kaj aŭdas la birdojn kanti, tamen mi ankoraŭ estas malgaja. Diru al mi la veron, ŝuflikisto, kaj mi donos al vi tri orajn funtojn."

Gratis la kapon la maljunulo. "Se vere estas, ke mi estas feliĉa (pro kio mi antaŭe ne sciis), estas pro tio, ke mi havas bonan amikon."

"Montru al mi vian amikon."

Tion faris la ŝuflikisto, montrante hundon. Miris la sinjoro kaj rapidis hejmen, ĝojante pro tio, ke li nun havas la sekreton de l'feliĉeco.

La ŝuflikisto kutimis enlitiĝi frue, sed tiunokte li pensis multe pri la vizito de la grandioza sinjoro. Precipe li primeditis pri la mono, per kiu la sinjoro rekomencis lin. Tri oraj funtoj. Neniam antaŭe li havis tiel multajn. Kiel uzi ilin? Li primeditis...

Pasis semajno antaŭ ol revenis la sinjoro. "Ho mensogulo," li diris, "vi trompis min. Mi aĉetis hundon, multvaloran, ne hundaĉon kiel la via, kaj ankoraŭ mi ne estas feliĉa. Diru al mi la malfalsan veron pri via feliĉeco kaj mi donos al vi kvar orajn funtojn."

"Sinjoro," diris la ŝuflikisto kuraĝe, "antaŭ ol vi envenis en mian vivon, mi nekonscie estis feliĉa. Tiam vi venis kaj demandis min pri mia feliĉeco, donante al mi monon. La mono ne rabis min je la feliĉeco, sed tion faris la analizado serĉe la kialon de ĝi. Pro tio, ke mi iĝis demandema pri mi mem mi iĝis malkontenta. Nun mi ne estas plu feliĉa, nek estos ĝis vi jam foriros."

"Tamen," persistis la obstinulo, "via feliĉeco devis havi kaŭzon. Diru al mi la kaŭzon, kaj mi donos al vi la monon, kiun mi promesis."

Malbenis la malsaĝulon la ŝuflikisto. "Nu," li mensogis ruze, "eble tio estis pro tio, ke kiam mi estis pli juna mi vojaĝis por du jaroj. Vi tion devus fari kiel eble plej baldaŭ."

"Ĉu efektive?" diris la sinjoro, "mi ekiros nun." Li foriris, ne rimarkinte la rideton de la ŝuflikisto, kiu restus tie—feliĉa? Kiu povas diri?

Pri la Militorigino.

De nia amiko nesubpremebla, J.E., ni ricevis la sekvantan: "Dankon al E-o mi korespondas fremdlandan pri div. temoj, inter kiuj Pacifismo. Mi ricevis de japana amiko la proponon: ke preferinde la homoj kun paco ĉe la koro, ol la mondo sen militoj. Mi respondis lin, ke mi ankoraŭ preferus vivi kun la plej malpaca ŝafaro, ol kun la plej paca tigraro.

"De Nederlando venis letero, kiu kulpigas Kapitalismon kaj Naciismon pro la militoj. Mi respondis, ke prefero oni serĉu la kialon ĉe la fonto mem, ol ĉe la marbordo. Kion faretas Petreto, tion faregos Petro. Kaj al infano, kiu lude forpinĉas flugilon de muŝo; al knabeto, kiu ĝuas kapti kaj elakvigi fiŝon—al tiuj mi imputas la militojn. Panjo, per siaj propraj aĉetoj, daŭrigas la buĉadon de mildaj bestidoj kaj birdidoj. Ĉu vi iam aŭdis la korpikajn kriojn de mortigota porko? Kaptita de la kamparano, kiel ĝi tremas, kvazaŭ jam flarinte la sangosoifan tranĉilon. Panjo, per siaj ĉiutagaj aĉetoj, daŭrigas tian buĉadon, konsekvence venas Moŝto Milito, por buĉi kaj dispecigi la idojn de Panjo.

En la mondon venis nova krizo, Tra la mondo iras la bojkoto, Per flugiloj de la civilizo Nun ni ĉiuj flugas al bankroto.

Jen Usono (ne plu soifanta), Ĝi la monan ŝiras organismon, Al la mond' eterne kreditanta Ĝi promesas bankan kataklismon.

Forte staras muroj de l'doganoj Inter la popoloj dividitaj, Sed ni ĉiuj saltas sur vulkanoj Per la danca flamo ekscititaj. (El "La Pirato," Partzo).

Bona Konsilo.—Se vi volas teni la aldonitecon de via edzo, knabino, kara, multe prizorgu lian internon, kaj vian eksteron.

Colac High School and Esperanto.

It is indeed gratifying to learn that the head master of Colac High School, Mr A. V. G. James, has founded a class of Esperanto students. The class, which numbers 24, meets out of school hours. We trust that the initiative of this gentleman, backed by the diligence of those who have undertaken the course, will result in permanent good to the movement here.

KRONIKO.

Brisbano: La komitato de nia societo aranĝis kamp-feston al Sunnybank, bela kampara loko dek mejlojn de la urbo. Granda nombro ĉeestis; multaj vojaĝis aŭte, aliaj trajne. Ni sin amuzis longe promenante la arbaron, ludante, kaj kolektante filikojn, k.t.p. Kelkaj akiris bonajn skizojn de la rivereto kaj ĉirkaŭaĵoj. Ke ĉeestis s-ino Window kaj s-ro Firth, maloftaj vizitantoj ĉe la societo, tre plaĉis al ni. Ni foriris de la piknikejo je krepusko, iom lacaj sed feliĉaj. Tiom ĝuintaj ĉi tiun, ĉiuj esprimis intencan ĉeesti la sekvantan piknikon.

Masterton, N. Z.—April 3 social evening held to honor visit of Mr. Miroslav Pavlinovich, after absence of 15 months abroad. Our friend gave an address on Esperanto in Jugoslavia, his country, and next day spoke from ZZZ on travel through France and Italy. Mr Franks then demonstrated the euphony of spoken Esperanto.

Dr. F. Williams en N. Z.

D-ro F. Williams, el Papuo, ageme ĉirkaŭkuradis ĉ. du semajnojn en la Nord-Insulo. Ĉe Wellington: Parolis ĉe loka E-o klubo kaj Societo de Amikoj. Masterton: Ĉe E-o klubo kaj tag-jurnala intervjuo. Wanganui: Parolis ĉe Rotaria Klubo, ĉe publika kunveno, kaj lernejo ĉe la Societo de Amikoj. Hawera: Ĉe Soc. de Amikoj. Palmerston North: Tag-j-a intervjuo. New Plymouth: Kunveno en privata domo, tag-j-a intervjuo. Auckland: Ĉe Soc. de Amikoj, kaj privata domo, tag-j-a int.

Nova membro de NZEA, la doktoro faris bone por la asocio dum sia viziteto al N.Z. (W.H.K.)

OBITUARY

With sincere regret we announce the passing on May 4 of Mr Kenneth, Simmons, of Hobart, at an advanced age. He was a sterling supporter of Esperanto. His widow and two daughters survive him.

Esperanto Radio Lessons

Through a rearrangement of the programs it has been found necessary to transfer the Esperanto lessons from 3 A. R. (Melbourne) to 3 L. O. (Melbourne). The lessons are now given every second Saturday evening at 6-30 p.m. The next will be on June 2nd.

We have a copy of "The Three Dreams and other Verse", by our old friend Mr. K. Simmons. Those interested in Australian literature as such can get a copy from Oldham, Beddome and Meredith, Hobart. One Shilling.

RECENZOJ

Filozofia Vortaro, kompilita de d-ro S. Kamaryt. Eld. Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc, Ĉeĥoslovakio. Prezo 4ŝ. Dediĉita al Theophile Cart, ĉi tiu 170-paĝa verko staras kiel belaĵo de la presarto kaj monumento al la pacienco kaj klero de sia aŭtoro. Kun fundevida elektemo li lerte inkluzivigis aŭ ellasis materialon, kun la rezulto, ke ni jam havas la unuan tut-Esperantan vortaron de la filozofio. Ĝi nomiĝas vortaro, sed ĝin oni povas rigardi efektiva enciklopedio de la terminoj uzataj en tiu fako, ĉar multaj el ĉi tiuj postulas unu ĝis du paĝojn da difina teksto, ekz.: Dio, Pragmatismo, Patristiko. Ĉiun terminon sekvas la konforma en la angla, ĉeĥa, franca kaj germana lingvo: (Doloro—a. pain; ĉ. bolest; f. douleur; g. Schmerz).

Makuletaj estas foja misortografio ĉe anglaj vortoj; la sama aŭ nekonsistenco ĉe certaj propraj nomoj. Studinda estas la diferencigo inter Intuicio kaj Intuo.

La verko kuŝu ĉemane de ĉiu E-isto, kies pensado amas serĉvagadi en la sfero filozofia.

Pri la Moderna Arto. Eld. Literatura Mondo; agento ĉe ni. La fakton, ke la "artkonsuma" publiko ne komprenas la diversajn direktojn de la moderna pentro, Kornfeld atribuas al la kritikistoj, kiuj ne ĝuste plenumis sian taskon prilumi la aferon. Kun trafa prudento kaj feliĉa ŝanco li sukcesis kunlaborigi d-ran Jan Brzezkowski, red. de L'Art Contemporain, kaj konata artfakulo, cele forigi almenaŭ iomgrade tiun pensnebulecon, kiu ombras por la simpla intereso la tendencojn kaj manifestojn de l'diversaj skoloj. 74 reproduktaj, tipaj por ilustru la kvarĉapitran tekston, supozeble plikostigis la verkon, kiu, preze 7 kaj 9 sv. fr., allogos preskaŭ sole nur izolajn intelektulojn.

Kio estas Oomoto? Eld. en Kameoka, Kioto-hu, Japanujo. Agento ĉe ni.

Verkante pri Cromwell, Lord Rosebery skribis: "Unu el la plej timinde potencaj karakteraj kombinaĵoj estas la mistika praktikulo". En Oomoto ni vidas sekton, kiu en rimarkinda grado konsistas el tia kombino, kaj kies adeptoj sekve estas strange spiritualismaj, intense agemaj. Jen la 5a eldono de relative vastavenda libro, kiu iom detale pritraktas la originon, ĉef-figurojn, doktrinojn kaj agadon de ĉi japana religio kun universala celo. Iom mirige estas, ke de paĝ al paĝo sin trovas terminoj aŭ eventoj prenita el la Nova Testamento de la kristanoj kaj aplikataj al aferoj Oomotaj.

E-o ŝuldas multon al Oomoto pro ties progresema utiligo de la interlingvo. Miloj da neapanoj eksciis kaj priinformiĝis la kulton sole pro ĝiaj E-aj eldonoj. Nun venas informo, ke angla traduko, "What is Oomoto?" ĵus aperis, do simpatiantoj povas per

ĝi propagandi inter konatoj ĉi faktoron en la pensado de la religia mondo.

(Robo).

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:— Miss E. B. Carrick, 4/6, March 35; Adelaide Esperanto Club (sales) 8/-; Melbourne Esperanto Club (subs.) £2/18/-, (sales) 4/2; Mr. J. S. Lennie, 4/6, April 35; Mr. Franks, 6/-, March 35; Mr. Facer, 5/-, 4/6, March 35; (overseas Sub.) 5/-, April, 35.

PLEASE NOTE

By the meagre little list above it could with reason be inferred that anything but general interest is taken in La Suda Krucio by those receiving it. Our only comment on the position is that should there be, within a very short time, no appreciable awakening of responsibility on the part of those concerned, the question of the paper's ceasing publication will present itself very insistently, and will receive only one answer. The gazette cannot continue without the appreciatory support of its readers, manifested in their reasonably prompt payment of subscriptions. We trust that this notification will not be forgotten with the reading, but will result in banishing the menace of extinction which at present confronts it.

Korespondado.

Volas inters. pri la kultura k. ekonomia vivo de via lando, Stojan M. Hiev, str. Strahil vajvoda 6, Ruse, Bulgarujo.

Reply Coupons.

Several readers have asked how to get reply-coupons. Every post office of any importance should stock them. Even small country post offices are under the responsibility of procuring them from their supply centres for those who order them. They were instituted by international convention, and now cost 5d. each. They are valid for 6 months from issue.

New Zealand Esperanto Association.

—Headquarters of the international language movement in New Zealand. Patrons: Sir George Fowlds, C.B.E., Auckland, and Prof. J. Macmillan Brown, Christchurch, Chancellor of the New Zealand University. President, Mr. W. L. Edmanson; Vice-pres., Mr. C. Brandon, Auckland, Mr. H. E. Facer, Palmerston North, Mr. A. Dewar, Masterton, and Mr. L. A. Eford, Christchurch. Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Wellington; Hon. Secretary, Mr. Wm. H. King (Room 106, G.P.O. Bldgs., Wellington, C.I.). Operations: Propagating Esperanto; arranging annual congresses; conduct of correspondence courses; supplying information, etc.

EL ESTONA PLUMO.

Kiuj studis fremdajn lingvojn, ili scias, kiom malfacila tio estas kvankam ne ĉiuj volas aŭ scipovas tion konfesi. Ofte la multlingvuloj simple trompas sin mem, kredante, ke post multjara pena studado ili posedas tiun aŭ alian lingvon. Sed oni povas facile kontroli la sciojn de tiuj personoj: donu al ili svedan tekston kaj petu ĝin tuj traduki al la fremda lingvo, sen helpo de vortaro kaj gramatiko, tiam vi vidos kiel bone ili konas la lingvon. Mi ofte spertis tion. Alia ekzemplo: estona profesoro, kiu multe studis kaj praktikis la francan lingvon, estante lingvisto, bezonis verki mallongan tekston en tiu lingvo. Sed antaŭ ol presigi la tekston, li devis ĝin doni al naskiĝinta franco por kontrolo. Kion vi opinias pri tio?

Eĉ pli: mi kuraĝas aserti, ke multaj instruitaj homoj ne estas tute kompetentaj eĉ pri sia gepatra lingvo kaj eĉ tie faras gramatikan kaj alian erarojn. Mi ja estas estono, mia gepatra lingvo estas la estona, en la universitato mia ĉefa studaĵo estis la estona lingvo, sed malgraŭ tio mi ofte devas konsulti vortaron kaj gramatikon, kiam mi skribas estonan artikolon. Certe mi ne eraras, asertante, ke 99% de la estona popolo tiam kaj tiam faras erarojn en sia gepatra lingvo, kvankam ili de la naskiĝo ĝin aŭdas kaj uzas. Kion vi opinias pri tio? Certe pli-malpli same estas kun la aliaj popoloj, des pli, ke la estonoj estas relative lingvo-kapablaj, pli ol multaj aliaj popoloj.

La germanan kaj francan lingvojn mi studis ek de la popola lernejo, mi legis multe da literaturo en tiuj lingvoj, eble pli ol en Esperanto, sed al mi estas malfacilege skribi leteron en tiuj lingvoj, kaj mi faras multajn erarojn, gramatikajn kaj stilajn. Mia stilo estas naiva kaj legante la leteron franco aŭ germano tuj rekonas, ke ĝi estas skribita de eksterlandano. Jes, oni povus diri, ke mi ne estas lingvokapabla, kvankam en la universitato mi studis lingvosciencan. Sed — post mallonga studado de Esperanto mi libere tradukis altnivelajn literaturajn verkojn al tiu lingvo, aperigis ilin en diversaj Esperantaj gazetoj, kaj eldonis ankaŭ tutan libron — Kvin noveloj de Fr. Tuglas. Tiam mi estis juna gimnaziano kaj tute nova esperantisto. Kelkaj recenzantoj skribis, ke tiu libro havas vere klasikan stilon. . . .

Mi resumas: Esperanto estas dudekoble pli facila ol iu nacia lingvo. Sed malgraŭ tio ankaŭ ĝi bezonas lernadon kaj studadon. Kiel simple estas iri, ĉu ne? Sed rigardu la infanojn, kiom pene ili lernas tiun arton! Same estas pri Esperanto. Des pli, ke nuntempe mankas ankoraŭ tiaj lernolibroj, per kiuj la memstudantoj povus tuteperfektiĝi sin en la lingvo,

PARALLEL TRANSLATION.

Rilato de la lingvoj al la efikeco.

Oni ne povas pruvi, ke la plej bonaj popoloj posedas la plej bonajn lingvojn. Grekujo disfalis antaŭ Romio. Kiu estis la pli bona popolo? Tio estas demando, kiu el ili estis la pli kapabla impresi sian lingvon kaj morojn sur la mondon? Konsideru la japanan lingvon. Se ekzistas sur la tero unu popolo, kiu fieras pri terurege malfacila lingvo, tio estas la japanoj. En la frua tempo de fremdula penetro en Japanujon, iu jezuita pastro raportis, ke la japanoj estas komplezemaj kaj ĝentilaj, sed ke ilian lingvon nepre la diablo elpensis! Modernulo povas opinii, ke tiu lingvo jam postvivis, sian supozitan patron, sed kiom koncernas la lernfacilecon ĝia reputacio ankoraŭ ne pliboniĝis. Tamen, kiu kuraĝus aserti, ke ĝi malhelpis al la nacia efikeco?

La vero estas, ke inter homoj parolantaj la saman lingvon, unu lingvo estas same taŭga kiel alia por la plenumado de ordinaraj aferoj. Ĝia vivi-povo aŭ disvastigo dependas, ne de ĝiaj esencaj bonkvalitoj kiel lingvo, sed de la sukceso de la popolo ĝin uzanta. Ekzistas tial neniam pravo antaŭsupozi, ke la plej bona aŭ plej taŭga aŭ plej facila lingvo disvastiĝos tra la mondo per siaj propraj valoraj, aŭ eĉ ke iu facila kaj reguleca lingvo finfine evoluiĝos. La presarto kaj ĝenerala klerigo jam plene haltigis sur la homaj lipoj la naturan procedon de lingvoevoluo. Jen unu el la faktoj, kiuj pledas por apliko de novaj artefaraj reformoj al la lingvo kaj ortografio, kiuj ne plu evoluadas laŭnature.

La samajn konsiderojn oni povas rilatigi ankaŭ al la libera konkurado inter rivalaj artlingvoj. La pli malbonaj povus venki samŝance kun la pli bonaj, ĉar la ĉefa faktoro ne estas la naturo de la koncerna lingvo, sed la influo kaj ĝenerala kompetenteco de la rivalaj subtenantoj. Komprene, ke tre maltaŭga aŭ malfacila lingvo ne venkus kontraŭ facila, sed transen de certa limpunkto de facileco artaj lingvoj ne povas iri, kaj supozinde estas, ke tiun punkton ili jam atingis. Estontaj projektoj montros inter si diferencojn en la lernfacilo tiel malgrandajn, ke la demando pri tia konkurado jam ne valoras respondon. La farinda ago estas, ekpreni facilan artlingvon kaj persisti ĉe ĝi.

Bearing of Language on Efficiency.

It cannot be shown that the best race evolves the best language. Greece went down before Rome. Which was the better race, meaning by "better" the most capable of imposing its language and manners on the world? Take Japanese. If there is one people on the face of the globe who rejoice in an impossible language it is the Japanese. In the early days of foreign intercourse a Jesuit father reported that the Japanese were courteous and polite to strangers, but their language was plainly the invention of the devil! To a modern mind the language may have outlived its putative father, but its reputation has not improved, as far as ease is concerned. Yet who will say it has impaired national efficiency?

The fact is, that for purposes of transaction of ordinary affairs by those who speak it as a mother tongue, one language is as good as another. Whether it survives or spreads depends, not on its intrinsic qualities as a language, but upon the success of the race that speaks it. There is, therefore, no presumption that the best or the most suitable or the easiest language will spread over the world by its own merits, or even that any easy or regular language will be evolved.

Printing and education have altogether arrested the natural process of evolution of language on the lips of men. This is one justification for the application of new artificial reforms to language and spelling, which tend no longer to move naturally with the times, as heretofore.

As regards free competition among rival artificial languages, the same considerations hold good. The worse might prevail just as easily as the better, because the determining factor is not the nature of the language, but the influence and general capacity of the rival backers. Of course, a very bad or hard artificial language would not prevail against an easy one. But beyond a certain point of ease a universal language cannot go, and that limit has probably been about reached now. Between future schemes there will be such a mere fractional difference in respect of ease, that competition becomes altogether beside the point. The thing is to take an easy one and stick to it.

kaj kie troviĝas ĉiuj detaloj de la lingva mekanismo.

Henr. Seppik.

(En "Svenska Esperanto-Tidningen" Jan. 1934).

Melbourne Esperanto Club.—Wednesdays, 8 p.m., Australian Church Hall, Russell-st., Melb. Mr. R. Rawson, 169 Exhibition-st.

Melbourne Esperanto Society.—Tuesdays, 8 p.m., Scots Church Hall, 97 Russell-st., Melb. Secretary, Miss L. Irwin, Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

Coburg Esperanto Club.—Thursdays, 8 p.m., Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Secretary, Mr. A. Spencer, 48 Munro-st., Coburg.

Sydney Esperanto Society.—Thursdays, 8 p.m., 2nd Floor, Manning Bldg., 449 Pitt-st., Sydney. Secretary, Mr. L. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto Society.—2nd and 4th Tuesdays in each month. State Service Union Room, 59a Elizabeth-st. Secretary and president, Mr. L. Parry.

Adelaide Esperanto Club.—Thursdays, 7.45 p.m., Paringa Bldg., Hindley-st., Adelaide. Secretary, Mr. F. Droop, 13 Chatsworth-grove, Toorak Gardens.

Westralian Esperanto Society (Perth).—Meets every week. Secretary, Mr. D. Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth.

New Zealand.

Wellington Esperanto Club.—Mondays, 8 p.m., Y.M.C.A., Willis-st., Wellington. Prez., s-ro Vernon Leck; vicprez., f-ino Coralie Smythson, D.B.E.A.; kasisto, s-ro L. E. Dust, D.B.E.A.; sek-io, f-ino Glen Carty, D.B.E.A.; 33 Tanera-cres., Brooklyn, Wellington, SWI.

Masterton Esperanto Club.—Tuesdays, 8 p.m., Y.M.C.A. Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A., 38 Worksop-rd., Masterton.

Auckland Esperanto Society.—Mondays, 7.30 p.m., New Church Hall, Newton-rd. Communications president, Mr. J. Russell, 2 Pukenui-rd., Epsom.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralia: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralia: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo—12 linioj: 3 ŝilingoj.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 162 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

26 Junio, 1934.

WHITHER PHILOLOGY?

What is philology's contribution to humanity? What relation has the prodigious research of Muller of a Bopp to the smoother working of the world? That the roots of present-day languages have been laid bare in the soil of a primitive Mother-speech; that a law governs the transmutation of consonants from tongue to tongue; that the words of our idiom can, by tracing back its stems to distant sources of derivation, be made to speak to us with fresh significance—these things are interesting, instructive, and may be so treated as to appeal to that considerable book-buying public of linguistic dilettanti.

But surely philology has some higher end, some more positive contribution to make to a world that has developed so lopsidedly. For while strides gigantic, even awesome when viewed in their implications, are being made in mechanical invention with every new day, there is a striking lag in other directions, cultural and spiritual. Space and distance are losing their meaning: the sending of a message to the ends of the earth is a matter of minutes. In the field of technics unifying influences are constantly at work welding mankind economically and geographically. But as far as language is concerned two professors, one from Rumania and the other from Japan, are as helpless to express themselves as ever they were. What has philology done for them, and for us? Would it not be right to say that the true end and aim of that branch of science, its very *raison d'être*, is the perfecting of some auxiliary speech medium, whereby the curse of language diversity might be lifted? Were civilised man able to defy the barriers of language; the scope of science would be extended and its progress accelerated beyond our present powers of conception. For the years now lost to the scientist in learning foreign languages, and the needless duplication of labor through ignorance of his

colleagues' activities, are simply a drag-weight on progress. The *International Age* calls for chairs of positive philology in all universities; an institute should be founded for inter-European language research and the study of international-language projects and the bases of their claims to adoption.

That language is not altogether a product of blind hazard and outside the control of the human brain is evidenced by recent discoveries relative to Sanscrit itself which point to that language as having been devised by a priestly caste 4000 years ago to offset the disintegration of the ancient Vedic; Akbar and the bringing to flower of Hindi or Urdu, the key language of modern India; the influence of Luther on his native German, and that of Dante, who fused the uncouthness of dialect into the glory of the Comedy. That composite languages have been practised among those of differing speech is seen in the Benguela of Africa, Lingua Geral of Brazil, Chinook of Canada, Lingua Franca of the Levant, and Pidgin English and Russian of the Far East.

True it is that Esperanto, the only widely used auxiliary tongue, has hitherto made its way independent of external authority, and while there is certain weight in the contention of Slav and other thinkers that Esperanto as a social factor would owe its general acceptance to economic causes operating outside the power of this body or that, it cannot be denied that a representative statement of belief in the principle of international language from those who speak for philology would markedly speed up the loosing of a tongue-tied world.

And philology is awakening to its responsibility. This may be inferred from the fact that numbers of present-day linguists not only assert the soundness of the idea, but defend some particular project claimed by them to function effectively. Among them are Jesperen, Breal,

Bailly, Schuchardt, Ostwald and Meillet, which last-named included a chapter on the problem in "Les Langues dans l'Europe Nouvelle". May we not hope that the philology of the future, in collaboration with those versed in the

study of auxiliary constructed language, will give to its researches a wider scope, a more definitely constructive plan, the fruits of which may soon be seen in mankind fully free from the shackles it has borne since Babel.

RECENZOJ

VOJAĜO EN FAREMIDON KAJ DU ŜIPOJ, el la hungara de F. Karinthy, trad. L. Totsche. Eld. Literatura Mondo. 84 p., prezo 1½ ŝil. Agento ĉe ni.

En milita mineksplodo hirurgo estas transportita sur planedon logatan de perfektaj maŝinstuloj, kiuj, parolante per lingvo de sonoj senlime superanta la lingvojn de teranoj, informas lin pri la degenera paraziteco de la homa speco. La noveveninto iras sub protekton de bonvola planedano, kun kiu li strange konversacias pri aferoj vere profundaj. Samforte interesa kiel la konata "Nova Sento" de Tagulo, ĉi verko pli subtile tuŝas la vivproblemojn precipe biologajn, kaj enhavas da ironio liniojn komparindajn kun certaj en L'Île des Pingouins.

Bedaŭre, ke Karinthy, en tia bril-satirema humoro, ne pli vaste pentris sian fantazion, etendante ankaŭ en la ekonomian kaj socian vivon la kontrastojn inter la planedanoj kaj la homoj. Por tio la nuna bone servus kiel enkonduka ĉapitro. La traduko de Totsche estas riĉa kampo de parolkaj sintaksturniĝoj. Sed cerbumigas p. 46: "Konscia vivo... kiu subjugas la fortojn kaŝigantajn la kruda kaj stulta materio" (kaŝitajn en...?).

En Du Ŝipoj Kolumbo staras role de Fido kontraŭ la Superstiĉo de Sinesius la alhemisto. Homo sentema sorbante la liniojn, aŭdas la naskoĝemojn de la Moderna Mondo.

Socialismo, Ĝia Ideologio kaj Realigo, de d-ro Chazan. P. 47.

Eld. N. Szapiro, Nowolipki 8, Varsovio. Trad. de? supoze el la pola.

La aŭtoro pritraktas la utopian aŭ evoluciisman socialismon, kaj la revolucian komunismon, montrante preferon al la unua, kaj akre kritikante la duan. Li asertas la influon de la religio, de la familio, de la profesiaj kaj kooperativaj unuiĝoj, eĉ de la civila leĝaro sur la evoluon de la sociema, altruista karaktero, paŝe al senkapitalista sociordo. Gravmanke estas, ke troviĝas nenia kritiko de Naziismo kaj Faŝismo, kies ŝtatpolitikoj kaj sociteorioj rekte kontribuas al la demando traktita de la aŭtoro.

Diroj, kiaj "Nur la materiala sekurigo liberigas la spiritajn fortajn", ŝajnas strangaj, vidate laŭ la historio.

7. "la utopiistoj konfidis (fidis) la estontan homon; 14." "kiam (dum) unuj estas adeptoj... la aliaj restas..."; kial tralibre "socia" kaj "sociala"? Dube, ke estas eĉ iometa nuanco.

Curso Completo de E-o, eld. de la Portugala Instituto de E-o, rua do Regedor 5-4, Lisboa. La unua kajero enhavas portugallingve 3 interesajn ĉapitrojn pri La Evolucio de l' Lingvo; La Problemo de Lingvo Internacia; kaj Esperanto. La rimarkoj pri la eblecoj koncerne eventualan amalgamon de la lingvoj altiros atenton.

La Profeto: 32 paĝoj da laborultendeca literaturo el la hungara. Prezo ses p. ĉe S.A.T., 23 rue Boyer, Parizo.

Interesa kiel aldono al la "Hungara Antologio." p. 30, "la feŭdalon (feŭdestron) piedpremis siaj (liaj) kampar-servistoj." "tredis" (tretis).

La Travivaĵoj de la Brava Soldato Ŝvejk dum la Mondmilito. J. Hasek: trad. el la ĉeĥa de J. Stadler. Prezo 3½ ŝil. ĉe 23 rue Boyer, Parizo.

Jen la dek unuaj ĉapitroj de granda verko. Tio estas bedaŭrinda, ĉar ĝenerale la legantoj preferus, en libro de 152-paĝa amplekso, kompletan rakonton. Supozinde, ke la eldonistoj aperigos la tuton, se montriĝos sufiĉe forta aĉeto de la provaĵo. Temas pri la aventuroj de neniel malbonhumorigebla duonidioto, kiu venas sub suspekton de la ŝtataŭtoritato. Ĝi pilkjetas lin de ejo al ejo, demandante, enkarcerigante, ĝis fine ĝi servigas lin al diboĉa armeopastro. Priskribante ĉi tiun, per ridokaŭzaj, aŭ naŭzaj, strekoj, la aŭtoro klare montras sian bataleman proletecon, kaj malice, satire, pripikas la Aŭstrujo-Hungarujon de la dummilita tempo. Ie kaj ie la tradukinto lasis la sencojn malklariĝi, kaj la linioj grincas neglate, sed entute lia verko spiras per la subtile komikanta spirito de la originalo.

121, "alia tago" (sekvanta); 124, "divenis" (diveni signifas konjekti ĝuste, do "konjektis diversajn aferojn"); 10, "Ni ne estus devintaj forpreni de ili Bosnion" (Ni devus esti ne forprenintaj de ili...).

(Robo).

B.E.A. Diplomon

gajnis F-ino D. G. Carty, sekretariino de la Wellington (N.Z.) Esperanto-Klubo, kiu pro tio ricevu korgratulon. F-ino Carty estas la sepa klubano, laŭ scio, kiu sukcese trapasis la ekzamenon.

S-ro W. J. Collins, de Christchurch, N.Z., lastatempe gajnis la diplomon kun honoro. Li saĝe akceptis la helpon de nia sindonema fervorulo, s-ro G. Gordon, kiu donis al li tradukan kurson kaj pruntis al li multajn librojn.

REVUO DE REVUOJ.

La Heroldo de E, 767, enhavas frapan artikolon de Brian Price-Heywood, Esperanto—ĉu ludo au kultur-faktoro? Pika kritiko al la troa abundo da suprajmaj E-istoj. Nun en Luksemburgo, La Juna Batalanto, liberala romkatolika, ne timas verki akuzojn kontraŭ la Naziismo. **Informoj de la Esp. Asocio de Estonio** de temp' al tempo aperigas pri-esp-ajn demandojn. **La Franca Esperantiso**, la nova organo de la Franca Soc. por E. Propagando, estas modelo de la E. gazeto. Ĉiu franclingvemulo inter ni devus kontaktiĝi kun ĉi entrepreno. **La Aŭstria Esperantisto** kuregas al subteno de la "savintoj de Aŭstrio," Dollfus, Fey, Starhemberg. Nin plaĉus scii pri la sinteno de la nova Viena municipo al la E. movado, ĉefurĝe kiom koncernas nian E. muzeon. **La Kritika Observanto**, 3-monata, donas panoramon de la mondpolitiko, vivas Hitleran reĝimon, kal profetas bankrotiĝon de la plano Roosevelt'a **Sennacieca Revuo** daŭre tenas altan nivelon de porproleta legvaloro. **La Pola Esperantisto** por Dec. enhavas lingvan notaron de L. Vienano, kiu asertas la frazon: "kiu daŭris ĉirkaŭ du horojn" esti nekorekta. Laŭ li ĝi devas esti "horoj", Ni petas lin pritrakti la Zamenhofan: "Mi bezonus nur ĉirkaŭ 200 rublojn" (La Revizoro 31/12) kaj similajn el Grabowski kaj Kabe. En la Marta la sama verkisto tutprave skurĝas la indiferentecon flanke de eldonistoj rilate al la Zamenhofaj tradukoj. "Ankoraŭ kelkaj volumoj de la Fabeloj de Andersen atendas sian aperigon"! Li pledas por ĝusta disvastigado de la jam aperintaj verkoj de Z. kun bela eksterajo, kaj deca, pura de preseraroj, eldonformo. **Lingvo-Libro**, la suplemento al Literatura Mondo, donas brillan defendon de porneologismaj principoj plume de G. Karczag. La sama verkanto atentigas, ke la japana literaturo bezonas por ĉiutaga uzo milojn de fremdaj vortoj okcidentdevenaj. Tial la neologismoj uzataj de E. verkistoj grandparte ankau por la japanoj ne estas tiel fremdaj, kiel oni opinius, almenaŭ ne pli fremdaj ol al hungaroj. Antaŭ ol la japanoj rezoluciu kontraŭ la "okcidenta vortimperialismo" ili protestu kontraŭ la enfiltrado de Eŭropaj vortoj en sian propran lingvon.

—R.B.

SPLITOJ.

Kial "Esperanto", Majo-Junio, 1933, kaj "Lingvo-Libro", N-ro 1, nomas nin "Suda Stelo"? Niaj Jugoslavaj kolegoj ne volus porti niajn pekojn.

"Ili valoras dufoje malpli ol la blankaj" ("Oomoto Int." p. 20, Aprilo, 1934j. Kion precize la verkinto volas komprenigi?

La sonlingvo priskribita en "Vojago en Faramidon" (Karinthy) rememorigas pri la unua interlingva projekto kiu atingis konsiderindan sukceson. Ĝi estis Sol-re-sol, bazita sur sep muziknotoj. Tago---doremi; semajno---dorefa; monato---dorezol; k.t.p. Ĝia aŭtoro estis Jean Sudre, franca instruisto, kiu komencis laboron super sia cerbido en 1817; nur en 1866, kvar jarojn post lia morto, aperis la unua lernlibro. Kvin dek jarojn Sudre propagandis la lingvon en Francujo kaj Anglujo. Viktor Hugo, Lamartine, Humboldt, kaj Napoleono 3a instigis lin. En 1855. ĉe la Tutmonda Ekspozicio, Parizo, li estis aljuĝita premion de 10,000 frankoj; ĉe la Londona, 1862, honoran medalon.

(Laŭ Drezon, "Historio de la Mondolingvo")

Paul Neergard, en "Fremdvortoj en Esperanto", rimarkigas, ke en francidaj vortoj -ik (ique) ofte estas sendomaĝe forigebla; ekz., erota, aŭtenta, hermeta, kiel jam en elasta k.t.p., anst. erotika kaj cetere. Similaj konsideroj povus aplikigi al la nacilingva finaĵo -al (komparu: imperial, national, social, regional, coastal, postal). Formoj kiaj imperial', social' nacional' ŝajnas do sufikse pleonasmaj.

Se vi kolektas ion ajn, kontaktu kun d-ro Josefo Takacs, Nagymaros, Hungarujo.

The Ljubljana Esperantists tell us that the biggest tourist agency in Jugo-Slavia, pleased with the success of their first Esperanto prospectus, have appointed an Esperantist clerk and published a second folder, "Slovenio", a fine piece of work. Ask for it from Esperanto-Klubo, Ljubljana, delavska Zbornica, Jugo-Slavia.

The first Palestinian Esperantist congress was held in January at Tel-Aviv, a town founded in 1909. It had 3000 inhabitants in 1919; today there are 48,000 and a Zamenhof Street!

La interpunkcio en E-o estas vere haosa. Ĉu ne pli klarige uzadi komojn nur antaŭ relativaj pronomoj determinativaj (A. continuative), ellasante ilin antaŭ kvalifikativaj (A. restrictive)? Dubesignife estas: Mi ne amas la infanojn, kiuj faras bruon:

- (1) Mi ne amas la (t.e., ĉiuj) infanojn, pro tio, ke ili faras bruon.
 - (2) Mi ne amas tiujn infanojn, kiuj faras bruon.
- (Ni pledas por forigo de la komo en ĉi-frazo).

Rimarku plue:-

Kun relativo determinativa (continuative)---

(a) Mia malnova amiko, kiu kutimas diri la veron, ne kuraĝis diri ĝin al mi en tiu kazo.

Kun relativo kvalifikativa (restrictive)----

(b) La amiko kiu ne kuraĝas diri la veron ne estas vera amiko. La tuta demando krivokas atenton de la koncernaj instancoj.

Petu Specimenon.

Ni tre volonte sendus al iu ajn specimenon de La SK kontraŭ unu respond-kupono.

Dum la tuta jaro, je kiu ajn dato, ĉiu Esp-isto rajtas proponi al la Akademio oficialigon de vortradiko. Tiu ĉi propono devas esti sendata al la Prezidanto, kune kun detalaj sciigoj difinotaj, sur tabelo, kies ekzemplero estas ricevebla laŭ peto al la Sekretariejo de la Lingva Komitato.

Laŭ "La Ondo de Esperanto," Julio 1912, la unua, kiu uzis la vorton "Majstro" aplike al D-ro Zamenhof estis D-ro A. Nauman. Kiam en la fino de 1891j. nia afero estis en danĝero, li originale verkis alegorian mirrakonton: La Mirinda Liro, en kiu li unuafoje uzis la menciitan vorton.

"LEXICON"

At last here's an Esperanto card game we can unreservedly recommend. Based on the principle of word or root building from lettered cards, the game offers endless interest and instruction to those who play it. From two to four persons can play with one pack; five to nine with two. The 52 linen cards are of finest finish, strong and well printed; a book of rules goes with them. The enterprise of the makers, John Waddington Ltd., Leeds and London, in making available this Esperanto edition should meet with the encouragement of ready sale. Over four million packs of the English edition are in use. Order through B.E.A., 142 High Holborn, London WC1. price 2/6 plus 3d. post.

PYKE MEMORIAL EXAMINATION

The Pyke Memorial Examination will be held on Saturday, 3 November. It is suggested that group secretaries form classes for special tuition. The examination is open to all, but students who have been studying for a year or less may compete for a special prize of five guineas. The Australian Workers' Esperanto Association is offering a special prize to their member who secures the highest number of marks. Will other organizations do likewise?

DID YOU KNOW THAT:

The Group for the Defence of Esperanto, in the French Chamber of Deputies, numbers now 68?

The North-German Lloyd, huge German shipping line, has published a splendid folder in Esperanto?

The original Esperanto poetry of Julio Baghy, a Hungarian, has been translated into Chinese and published in Shanghai by M. Bakin?

A Swedish film company will turn the principal ceremonies at the Esperanto World Congress to Stockholm in August? Over 1100 from all corners of the world will be there.

The Czech railways have authorised the display of Esperanto plaques, "Esperanto-Info" on railway stations?

The Brazilian Posts have decided to issue a second series of 39 postcards with photos of the federated States accompanied by text in Portuguese and Esperanto?

In Finland 2000 listeners asked for a course in Esperanto? The Helsinki and Lahti stations now broadcast courses.

AN ESPERANTO CONCERT

An Esperanto Concert of dramatic items, all of a humorous nature, will be given by the Coburg Esperanto Group and the Melbourne Esperanto Club in the Australian Church Hall, 19 Russell St., Melbourne, on Wednesday, 18 July. Much effort has been spent in arranging the program, and a very entertaining evening can be promised. Concerts such as this provide for Esperantists who are no longer attending groups, an opportunity to meet old friends and for isolated students to hear the spoken language. Venu multnombre!

Is it you?

Many of our regular subscribers postpone paying their subscriptions, in some cases for a few months, in others for a year or more. The fact that we know that some day we will get the money is not enough. We must pay the printer month by month. Should the time arrive when we have no money in hand we shall have to cease publishing, although we may be owed more than the cost of an issue of the paper. Will you assist us by remitting immediately you are advised your subscription is due?

PARALLEL TRANSLATION.

La neevitebleco de l'milito.

En sia kritiko de "La Sanga Trafiko" (Fenner Brockway), iu ankoraŭ asertas la tre malnovan sofismon, ke la homoj estas laŭnature batalemaj. La homoj, kiuj nuntempe montras sin batalemaj en intensa formo estas sole tiuj, kiuj ankoraŭ restas ĉe la lanc-kaj-ĵetponarda evoluŝtupo. La moderna homo, rigardata kiel ano de l'socio, tute ne emas batali. Ĉiokaze, homa batalemeco aŭ la mala neniel tuŝas al la kaŭzoj de militdeklaroj. Tiujn ĉi ordinare faras kelketo da maljunuloj, kiuj estas plejparte el viretoj forte timemaj. La fakto, ke preskaŭ ĉiu lando dekretis devigan militservon en la lasta kataklismo estas klara atesto por la nevolo batali. En demandolisto la respondoj de volontuloj probable montrus, ke ĉirkaŭ 80 p.c. militiris pro emo al aventuro, nedeziro ricevi blankajn plumojn (1) aŭ iu alia kialo tute nerilata al avido batali kontraŭ fremduloj. La grandaj nacioj jam dek kvin jarojn vivas pace. Se dek kvin, kial ne cent dek kvin, aŭ mil dek kvin? La homaro jam akceptis la formulon, ke militoj estas neeviteblaj. En la nuno tiu estas vera, tamen la tielnomata batalemeco de l'homoj havas nenian rilaton al ĝi.

El "Sydney Bulletin"

(1) Inter la angloj, signo de malestimo pro ies supozata manko de kuraĝo.

The Inevitability of War.

In a critique of Fenner Brockway's "The Bloody Traffic", someone repeats the old, old yarn about mankind's being "belligerent by nature."

The only human beings who display belligerency in an intensive form at this time of day are still at the spear and assegai-throwing stage. Modern man in the mass is far from belligerent. In any case, belligerency in general has nothing to do with declarations of war. They are usually decided on by a few elderly people, themselves often the most nervous of mortals. The fact that almost every country had to resort to conscription during the last cataclysm speaks for itself. As for the volunteers, a questionnaire among those who joined up would probably have revealed that about 80 p.c. went owing to a desire for adventure, a distaste for being handed white feathers, or some other reason entirely unrelated to a desire to fight with strangers.

The great nations have been at peace now for 15 years. If for 15, why not for 115 or 1015?

Mankind has adopted the formula that wars are inevitable. They are at present, but mankind's alleged belligerency has nothing to do with it.

Esperanto Radio Lessons

Esperanto lessons are broadcast from 3 L.O. (Melbourne) every second Saturday at 6-15 p.m. The next will be on June 30th. If you approve of these lessons write a letter of appreciation to 3 L.O.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:- Mr. H. M. Lanyon, 13/6, Sept. '34 (3 copies); Mrs Macleod, 5/-, May '35; Mr Pate, 4/6, May '35; Brisbane Esperanto Society (Sales) 12/-; Mr Midthus, 6/-, June '35; Melbourne Esperanto Club (Subs). 18/-; Coburg Esperanto Club (sales) 1/6; Mr A. L. Cooper, 4/6, April '35.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto al:-D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA.

Melbourne Esperanto Club.—Wednesdays, 8 p.m., Australian Church Hall, Russell-st., Melb. Mr. R. Rawson, 169 Exhibition-st.

Melbourne Esperanto Society.—Tuesdays, 8 p.m., Scots Church Hall, 97 Russell-st., Melb. Secretary, Miss L. Irwin, Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

Coburg Esperanto Club.—Thursdays, 8 p.m., Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Secretary, Mr. A. Spencer, 48 Munro-st., Coburg.

NIA POSTO.

S-ino C.T. en N.Z. The difference between kotizo and abono is this: a kotiz(a)jo is a member's subscription to a club, or to a gift to a fellow member or such, while an abon(a)jo is a subscription to a publication or a seat in a theatre or similar.

Al ĉiuj. We thought it hardly necessary to point out that the number of LSK dated February 8 should have been dated March 8. The page numbers are in order.

Sydney Esperanto Society.—Thursdays, 8 p.m., 2nd Floor, Manning Bldg., 449 Pitt-st., Sydney. Secretary, Mr. L. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto Society.—2nd and 4th Tuesdays in each month. State Service Union Room, 59a Elizabeth-st. Secretary and president, Mr. L. Parry.

Adelaide Esperanto Club.—Thursdays, 7.45 p.m., Paringa Bldg., Hindley-st., Adelaide. Secretary, Mr. F. Droop, 13 Chatsworth-grove, Toorak Gardens.

Westralian Esperanto Society (Perth).—Meets every week. Secretary, Mr. D. Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth.

New Zealand Esperanto Association.

—Headquarters of the international language movement in New Zealand. Patrons: Sir George Fowlds, C.B.E., Auckland, and Prof. J. Macmillan Brown, Christchurch, Chancellor of the New Zealand University. President Mr. W. L. Edmanson; Vice-pres; Mr. C. Brandon, Auckland, Mr. H. E. Facer, Palmerston North; Mr. A. Dewar, Masterton, and Mr. L. A. Eford, Christchurch. Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Wellington; Hon Secretary, Mr. Wm. H. King (Room 106 G.P.O. Bldg., Wellington, C.I.). Operations: Propagating Esperanto; arranging annual congresses; conduct of correspondence courses; supplying information etc.

New Zealand.

Wellington Esperanto Club.—Mardoj, 8 p.m., Y.M.C.A., Willis-st., Wellington. Prez., s-ro Vernon Leck; vicprez., f-ino Coralie Smythson, D.B.E.A.; kasisto, s-ro L. E. Dust, D.B.E.A.; sek-jo, f-ino Glen Carty, D.B.E.A.; 33 Tanera-cres., Brooklyn, Wellington, SWI.

Masterton Esperanto Club.—Tuesdays, 8 p.m., Y.M.C.A. Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A., 38 Workshop-rd., Masterton.

Auckland Esperanto Society.—Mondays, 7.30 p.m., New Church Hall, Newton-rd. Communications president, Mr. J. Russell, 2 Pukenui-rd., Epsom.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralia: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralia: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo—12 linioj: 3 ŝilingoj.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 163 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

1 AŬGUSTO, 1934.

NEW ZEALAND ESPERANTO ASSOCIATION. 15th OFFICIAL BULLETIN.

A successful conclusion of the 5th N.Z. Congress marked the commencement of a fresh era of work for the newly-appointed NZEA Executive; and a survey of the past five months' operations discloses a strengthening of the movement in New Zealand as a direct result of NZEA activities. As expected, much work followed the congress: preparation of NZEA records and various reports (see "S.K." for March), actions on congress resolutions, audit of finance, disposal of photographs and giving information. With the foregoing, together with work of recruiting members, an extremely busy period has been experienced.

Members and Donations.

At 15 June '83, including 13 new members, have been enrolled for the present year; it is expected that at least 14 will yet come forward to enable last year's total to be passed. Fortunately, the N.Z.E.A. possesses well-wishers who have this year given £3/19/3 for the furtherance of Esperanto in New Zealand. For this, we thank the following:—Mrs. L. Lovell-Smith, 7/6; Mrs. Chapman Taylor, 7/6; Mr. H. E. Facer, 2/6; Dr. E. S. Dukes, 7/6; Mr. J. B. Bartulovich, 3/-; Mr. A. C. Ward, 10/-; Miss S. McCarthy, 5/-; Mr. J. A. Hodges, 4/6; Mr. C. Brandon, 7/6; Mr. G. L. Pivac, 3/6; Mr. M. Pavlinovich, 7/6; Mr. R. W. E. Pud-

ney, 2/6; Miss V. M. Weaver, 5/-; A.C.C., 1/-; Miss P. Carlton, 2/3; Mr. G. L. Pivac, 2/6 (second donation). Gifts of books (Mr. Geo. Gordon) and of a rubber-stamp (Mr. H. E. Facer) are also thankfully acknowledged.

NZEA Standing Committee

at a meeting held 24 May decided that (1) the Palmerston North Club be communicated with regarding fixing dates of the 6th N.Z. Congress; (2) inquiries be made at Whangarei, Dargaville, Hamilton, Hastings, Nelson, and Dunedin concerning the prospects of establishing or re-establishing clubs in those towns; (3) endeavors to be made to arrange for an NZEA official to address the respective principals and staffs of the fourteen Wellington secondary colleges regarding Esperanto; (4) it be ascertained whether Esperanto teaching still remains a plank of the N.Z. Labour Party's platform; (5) particulars of the NZEA be supplied to UEA for inclusion in the Esperanto year-book, a donation of 5/- to be made for the service; and (6) authority to be given for the printing of necessary stationery.

In connection with (1), (2) and (6), action is now en train; (3) replies from the colleges are being received and two principals have arranged meetings; (4) an affirmative reply has been received from the General Secretary,

N.Z.L.P.; and (5) arrangements have been made with the N.Z. Chief Delegate of UEA (Mr. Dust).

International Co-operation.

Activities under this head comprise the supplying of an abridged report of the 5th Congress to UEA for publication in "Esperanto"; writing of the following articles: "Heroino de Infaneco" (the bravery of the child Frances Mason in the Kakariki Railway bridge tragedy) for "Heroldo," and "Unua Trans-Tasmana Aerpoŝto" and "La Nova Telegrafa Tarifo de Novzelando," for "Interligilo de P.T.T." (Paris); the preparation of club reports and announcements for "S.K."; and the answering of overseas correspondence and requests.

Propaganda.

The practice of supplying overseas visitors to Wellington with suitable literature has been continued, and among those supplied were Mr. Bernard Shaw, Major Douglas, Sir Hubert Wilkins, E. J. Lee (world motorist), Dr. Fong (Rotary delegate), Dr. Williams (journalist), Sir John Allen (banker), Mr. Van Loon (lecturer and author, on liner "Franconja") and Dr. Norwood (preacher and peace worker). Tourist matter received from Rio de Janeiro and Austria was distributed to clubs and to the N.Z. Publicity and Tourist Department; and certain

journals, e.g., the organ of the Sun Yat Sen University, have been circulated among interested members. Articles (3) relating to Basic English published at Wellington and Dunedin were forcefully answered, and at present efforts are being made to arrange a series of four lectures from station 2YA (Wellington). (N.B.—Written requests for such lectures addressed to the General Manager, N.Z. Radio Broadcasting Board, Wellington, will help to attain this objective).

Services; Encouraging Signs.

Close contact has been kept with Dominion clubs and in five months requests to the NZEA for information numbered 40 and continue to be received. BEA diplomas have been acquired by members, Miss D. G. Carty, Wellington, and Mr. W. J. Collins, Christchurch. Two new clubs (at Wanganui and Palmerston North) have been established this year and both report increases in membership. Several NZEA members have paid arrears of subscriptions covering up to three years.

Secretarial Requests.

Members no doubt regret the curtailment of "La Suda Kruco," the NZEA official organ. Only by continued support and more subscribers can the journal recover its position, and all who have 5/- to spare are enjoined to help it. The Universal Esperanto Association, Geneva, which issues a first-class organ monthly, also is worthy of support. (Mr. L. E. Dust, 20 Chelsea-st., Miramar, Wellington, will supply information). With the biographies of 40 Dominion Esperantists in hand, the NZEA wishes to extend its record or "Who's Who." Forms for supplying particulars are obtainable on application. Names and addresses of Dominion Esperantists willing to accept overseas correspondence are also desired.

Subscriptions, etc.

Members who have not yet enrolled for 1934 are requested to either forward their subscriptions (2/6) to the NZEA secretary (Mr. Wm. H. King, Room 106, G.P.O. Bldg., Wellington, C.I.) or to pay their local club secretary. A marginal cross denotes the fee is due. Every member is a valuable unit and enables the NZEA to further its work. Anticipatory thanks; also to those who have so loyally supported the association.—W.H.K.

KRONIKO.

Hamilton, N.Z.—Dank'al agado de s-ro Ivan A. Smith, klaseto fondigis en tiu-ĉi urbo. S-ro Smith reklamis en loka tagjurnalo pri starigo de klaso kaj ankaŭ parolis de la Hamiltona radio-stacio, 12H, pri Esperanto; la rezulto estis ke sepaj klasoj hultempe funkcias en N.Z. Sukceson al la entuziasma gvidanto.

Wellington, N.Z.—Bonega laboro, propaganda, instrua kaj praktika daŭras ĉe la klubo, kiu posedas tre ageman Komitaton. Progresinte tiel bone, la lernantoj klubaj de 1934 provizis specialan programon je 26 Junio. Sub direkto de sia instruanto, s-ro Bertram Potts, la lernantoj prezentis ricoplenan programon, kiu enhavis muzikon, burleskan komedion, kaj durolan teatraĵon. Laŭdinda afero estis vidi ke la du junaj filoj de s-ro Potts partoprenas en programero.

Palmerston North, N.Z.—Starigite ĉi-tiun jaron, nia klubo progresas kontentige. Novaj membroj daŭras aliĝi, kaj klubanoj jam aranĝis festvesperon. Ni celas sukcesigi la 6an N.Z. Esperanto-Kongreson ĉe ni, kaj jam antaŭenrigardas al la versajnaj datoj—31 Decembro kaj 1 kaj 2 Januaro.

Kio estas idol-adoro?

Oh wad some Power the giftie gie us
To see oursels as ithers see us.

Ho, bone en speculo klara
Sin vidi laŭ l' okul' ĉiujn aliajn.

Neniam okazis la sekvanta; ĝi neniam povus okazi. Tamen, permesu, ke sincera rakontisto sekvy la fabelan fadenon kien ajn ĝi kondukis.

Foje, ano de granda kulturaĵo, vojaĝante, renkontis mandarenon apud Budaa idolo el oro. "Kiel," demandis li al la hino, "vi povas tiel malsage riverenci tian double-vizaĝan monstran karikaturaĵon?"

"Pardonu, via miŝto fremdlanda," respondis la mandarenó, "vi mem ĉi tion devus jam priciei. Mi jam aŭdis pri via grandioza lando, kaj estas dirate, ke dum paĉa tempo ĝi turnas al la cetera mondo la vizaĝon de la serena Kristo, admohanta: "Amu la malamikon." Sed tuj kiam la mondo fariĝas malpaca, oni vidas la alian flankon, teruran, bestan, malserenan, ekkriantan: "Forpafu! Mortigadu!" Kaj multnombrajn manojn havas via double-vizaĝa naciego, kiuj ĉiam emas enŝovi sin en aliulajn poŝojn por tiu sama brilanta oro. Kaj centon da piedoj ĝi kreskigas al si por samtempe stari sur la nukoj de la tributuloj. Eĉ se la Budaa idolo estus ridinda, via or-adora popolo devus reteni la ridemon."

Tiun prediketon nia vojaĝanto, estante ortodoksa imperiano, respondis, tamen ion subvoĉe, per la difro karakteriza: "Damninda impertinentulo!"

(J.E.)

ANKORAJ PRI NEOLOGISMOJ. El "La Revuo," 1910, p. 231.

Ĉiu raso, ĉiu nacio posedas en sia vortrezoro netradukeblajn vortojn, kiuj ordinare estas ĝuste tiuj, kiuj plej bone esprimas ĝian propran genion kaj ĝiajn kutimajn kaj karakterizajn priokupojn. Ĉar ni tre facile akceptas en la internacian lingvon la nomon de iu nekutima redingoto aŭ de iu fremda ilo, ni ne povas malpermesi, ke la animo de iu popolo elkrii siajn dolofojn kaj gojojn tiajn, kiajn ĝi sentas ilin, kun iliaj distingigaj nuancoj kaj kvazaŭe kun ilia naskiĝa sonkoloro. Preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj adoptis la vortojn "spleen, humour, kaj virtuo," kiujn enkondukis la Angloj kaj la Italoj. Ili estos devigataj, pro la pliiĝo de la internacia komunikado kaj intersanĝado, adopti aliajn vortojn, kiuj nun ekzistas nur en unu sola lingvo. Despli prave, iu lingvo internacia estas devigata akcepti la vortojn, kiujn oni nomas netradukeblaj. Zamenhof, pri tiu ĉi punkto, same kiel pri multaj aliaj, donis al ni imitindan ekzemplon de saĝa kaj prudenta toleremo, permesante al s-ro R. Leite enkonduki en lian esperanto-portugalan vortaron la neologismon "saŭdado," kiu esprimas la maldolan plezuron, kiun oni sentas ĉi la sufero kaj, la malĝojo, la doloran dollecon de la rememoroj kaj de la bedaŭroj. La netradukeblaj vortoj de tli speco ne ekzistas nur ĉi la portugala vortrezoro. Ĉu lingvo internacia ne devas akcepti kaj kvazaŭe sancivi-taŭli kelkajn gerthantajn aŭ francajn vortojn, kiujn ĉiuj vorto el alia ajf lingvo ekzakte sanivaloras?

La Fundamento, per iu feliĉa ŝanco, liveras al ni la rimedon por traduki sufiĉe akurate la vorton "Sehnsucht," kiun la franca lingvo, en kiu mankas la vorto "sourirante," povas nur traduki uzante longajn kaj netradukeblajn ĉirkaŭfrazojn. Sed kiamaniere; ne prunteprenante la radikon mem el la germana lingvo, ni povas esprimi ĉiujn ideojn eitenatajn en la tiom ofte uzata vorto "gemütlich," kaj signi tiun ĉi simplan miksadon de la agrablaj impresoj, kiujn naskas la materia facileco kaj la komforteco de la vivado kune kun la mildaj, kvietaj kaj amemaj sentoj, kun la morala bonstato, kiujn ni sentas en medio plena je simplanimeco, bonhomeco kaj koreco? Kiam estos pruvite, ke la esperanta vortrezoro sufiĉas por traduki ne nur proksimume, sed tute kontentige kaj ekzakte, la grandajn literaturajn verkojn de ĉiuj epokoj kaj de ĉiuj landoj, tiam, sed nur tiam, ni rajtos malpermesi la uzadon de neologismoj al tiuj, kiuj faras aŭ imagas fari literaturan laboron.

(Prof-o Grosjean-Maupin.)

1000 ADDRESSES—40 LANDS!

The 1934 "B.E.S. Adresaro" is to hand! There are only a few copies available, and they're worth having. The price to the agent is 1/8, which with postage and exchange barely enables him to sell at 1/6 a copy. Order now!

YOUTH AND AGE.

Several small children talk Esperanto with as much ease and accuracy as their mother-tongue. In some cases they learnt Esperanto at the same time as the mother-tongue of their parents. "The British Esperantist" gives proof of the easiness of Esperanto for children, even when not learnt in so natural a way. Joan, who is in her eleventh year, was given an Esperanto textbook on the 20th October; on the 28th of the same month she wrote the following postcard to her uncle, and received no help from anyone in her studies.

Kara Onklo Kia, kaj estimata Samideano,

Jen mi estas scribant letero, estas Esperanto, kaj mi deziras vi estas povi legi ĝi. Mi desiras bona fest sur sabato . . . Mi petas vin scribi re al mi en Esperanto. Mi desiras vi al veni, kiu ni interparoladus. Doŝi mia am al "malonklo" Maudo . . .

Tre sincere via, JOAN.

The text contains many errors, but can easily be understood. Joan shows that she has mastered the principles of Esperanto by the jocular use of the prefix *mal-* with the word *onklo* (*mal-*denotes opposites; *onklo*, uncle; "*mal-onklo*," the opposite of uncle, i.e., aunt. This use is incorrect, but it appears from her quotation marks that Joan knows this and will have her little joke).

At the same time an Esperantist writes that he is now ninety years old, and learnt Esperanto at eighty-three. He was successful in the Esperanto examination of the London Chamber of Commerce.

When age and youth meet thus, there can be little question of the ease and simplicity of Esperanto.

KORRESPONDADO.

Volas kor. Nicholas T. Bortich, Tartagal, Prov. de Salta, Argentina; D-ro Kurt Haase, Lenzsoher Str., 88, Leipzig W35, Germany; Gabriel Horvath, Pest-szt-Lorincz, Petofi-u. 44, sz, Hungary.

THE B.B.C. MIGHT NOTE!

Said Mr. E. Fisk, managing director of Amalgamated Wireless (A/sia) before the Legacy Club on 28 June:—"With television a universal language will be necessary. Such a language would do more to promote peace in the world than all the armaments and political theories." (Age, June 29.)

RECENZOJ.

KANTOJ DE L'AMO KAJ SOPIRO: de E. Mihalski, L.K. Eld. N. Szapiro, Varsovio, Nowolipki 8. Prezo 1s., pĝ. 48.

La subtitolo de ĉi tiu kolekto, plejparte el jaroj 1917-20, estas "poemoj de naiva juno" (junulo aŭ juneco?). La jam matura aŭtoro do supozis ilin publikigindaj malgraŭ ilia naiveco, sed ne intencis per ili doni instruon elmar-telitan el la vivosperto. Pagon post pago li montras sin pentristo de la pure erotika; pro troa uzofito radikoj kiaj *dezir'*, *kares'*, *kis'*, *kor'* perdas sian bonodoron kaj fariĝas sekaj, eĉ tedaj. Estas strange, ke Mihalski, nun edukisto en Stalin Donbass, povis fari tiajn amstrofojn dum la mondkuaj monatoj en kiuj lia lando baraktegis en la naskdoloro de nova sociordo. Skribi pri dancanta virino, papilia amaĵo, dum ke ĉirkaŭ li tondris kanojoj silt kvint frontoj! La pliparto de la poemoj estas sen titoloj; la legantoj povas aldoni la siajn.

"Verso" signifas ne strofon sed linion de strofo. 16, "ravigaj" (ravaj); 19, "alfiu" (alfiu); 26, "junino," komparu 32; karino. Ĉu M. uzus satitio anstataŭ satulino?

TUR-STRATO 4, de H. Weinhen-gst, eld. Literatura Mondo, Budapeŝto. Prezo 4s. Pĝ. 176.

Originala verko scenigita en la laborista kvartalo Viena. Ĝi estas kvazaŭ ĉeno forĝita en la laborejo de l' Mizero. Unu post la alia sin sekvas la brutalaj batot de socia ĉirkonstanco sur la kompātindajn korojn de tiuj vegetantaj sur la rando de l'abismo. Kun arto Zola-simila, kaj tre simplaelementa, ĉi nova stelo de la E-a literaturo arde sed mal-sentimentale pentras la sortojn de honestaj homoj faligantaj al la feĉa fundo de sistemo jam ekonomie stulta. La libro ne donas ŝvite planitan romanon, sed pliguste serion de bildoj el la nuna mondfrasko; ĉi tiu, kiel ĝi eĥas sur la animojn de la pan'sajiraj klaso. Nur malofte la aŭtoro sin per-fidas socialisto; foras subtila rezonado, psihologia frazumado, kaj politika agitismo. La nuda esprimovo per kiu W. detiligas la fizikan kaj mensan agonion de la Vienaj proletoj estas pli potenca ol tiaj rimedoj. Multaj; frapite de lia verko sentos la koron graviti en simpatio al niaj socie-prematoj kaj la ĉerbon serĉi taŭgan dialektikon por ilin liberigi.

La stilo-impigo de W. estas tre plaĉa. Sed neŝonaj i.a. estas: *alfiel*; *si* revis pri edzeco (edzineco); ilia edzeco (geedzeco); geamantoj, geviroj (simple, amantoj, homoj); mi ne povas helpi tion (mi ne povas ne fari tion); ter-pomoj formis (konsistigis) sian man-ĝon; Mi iris erare al O.; anstataŭ al E., kiel mi estus devinta (devus irinta). (Robo.)

ESPERANTO RADIO LESSONS.

Esperanto lessons will be broadcast from 3LO (Melbourne) at 6.15 p.m. on the following dates:—Aug. 11th and 25th.

VINTRO.

De J. Gray.

Oni ofte vortpentras vintron esti maljuna homo kun korpo kurba kaj vizago malagraba. Li kutimas travojaĝi la landon, tremfaligante foliojn for de l'arboj, kaj per sia malvarmega ŝpiro verŝatite morton al ĉiu nefortika kreskaĵo. Lia ridado estas la vento.

Tamen, ekzistas iom da homoj kiuj ne majamas la vintron. Kiam la arboj laŝas fali la foliojn, kaj la branĉoj aŝpektas iuĝaj brakoj, sin etendante al la ĉielo, estas ankoraŭ certa belco sur la tero. La herbo estas verde pura; kaj multe el la pli fortaj floroj plene pompas.

Ho, la plezuro ĉe vintra mateno, vekigi kaj senti la malvarman aeron blovi sur la vizagon. Kiel pinĉita pro frosto estas la nazo! Kiel agrable, senti la korpon tiel varma, komforta, sub la lankovrilo! Vere, ke ellitiĝi ne estas tiel agrable, sed la energia ŝtupo per preskaŭ glacia akvo, kio sekvas ellitiron, jen unu el la plej bonaj okazaĵoj en la tago.

La ŝatindeco de la domo plievidentigas en vintron. Oni amas hejmrusti la vintrajn vesperojn. La mensa biftlo de ĉambro kun gajiga fajto kaj okulkaresa lumo rapidigas la paŝojn de multaj, kiam ili nokte ekiras hejmen. Tiam, post la vespermango, la familio sin arigas apud la fajro. Ili komencas trikadi, legadi; enŝaltas la radiilon. Ekstere la vento muĝas kaj la pluvo torente falas. Intere estas trankvilo.

Se, do, homfiguro povus simboli la vintron, ĝi devus esti militisto, rapidante tra la lando, portante ne nur glavon, sed ankaŭ ŝildon. La vintron ne estas venĝema profundaĝulo; ĝi estas giganto okaze energia, okaze laciga, sed ĉiam nobla.

SOCIETA VIVO.

Al suista laborejeto venas iu kliento, por malgrava riparo. La estro komencas la laboron kaj dume rakontas al la kliento pri la malfaciloj de la nunaj metistoj, pri la teruraj impostoj, ŝuldoj, iu-pago. Oni eĉ ne scias pro kio la homoj laboras, nek per kio li vivas.

Mi miras, fine ĉiras la kliento, klamantere en tiuj kondiĉoj vi povas vivi kaj labori.

La estro montras la helpanton. Sinjoro, rigardu lin. Tiu ĉi knabo laboris ĉe mi dum du jaroj, kaj mi nenion povis pagi al li. Mi tiom ŝuldis al li, ke li prenis mian laborejon kiel pagon. Kaj nun mi jam laboras la duan jaron por depreni ĝin de li!

VARIA.

Str Norman Angell, famed author of The Great Illusion, is now a member of the British Esperanto Association.

Senhor Ismael Braza, "consul" for the Universal Esperanto Association, sent to 250 Brazilian journals a petition that they open an Esperanto course in their pages. He received from 82 papers, in 75 towns, an affirmative response, and 25 journals have opened a course.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo—12 linioj: 3 ŝilingoj.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 164 (15th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

6 SEPTEMBRO, 1934.

ENGLISH GENEROSITY.

We English are a generous race; some of us, embarrassingly so. The latest proof of this trait is given by Sir Richard Paget, Bt, in his "Babel—or the Past, Present and Future of Human Speech." He proposes to make a present of the English language to the world, after we have done a little re-modelling to make the gift a worthy one. In his opinion,

if the language were improved . . . so as to make it consistent, but without altering it so much as to make the classical form difficult to understand, English would in all probability become in a relatively short time the universal language of the planet.

Sir Richard is a bit ahead of himself, for we are not inclined to alter and maltreat our language, so that it may be further bedevilled by the rest of the world. For the alteration would have to be very drastic; it would not be enough merely to straighten out a few irregularities, and remove some exceptions: it would be necessary to shun the idiomatic use of the language—which would be tantamount to killing it. To appreciate this, it is only necessary to listen to a well-educated German or Frenchman with a talent for languages, who has made five or six years' diligent study of English: he may remember all the exceptions and irregularities, but in almost every phrase he will sin against idiom; his

speech is foreign, strange. Imagine English being used all over the world by men, the majority of whom have no special aptitude for mastering the subtleties of foreign tongues for their innumerable purposes! Each nation has its own habit of thought, which its own language best expresses. If English could mould itself to the thought processes of all nations, it would no longer be English; and the loss would not be only ours—it would be a real loss for the world.

This misdirected generosity would involve two consequences which would not please the non-English-speaking world: first, it would involve the domination of the world by the English-speaking bloc; and second, it would mean the disappearance of the cultures and civilisations of other peoples, which, think the others not unreasonably, are by no means inferior to ours. It will be better for all concerned if we leave the international auxiliary job to the language specially designed for it; our generosity will be shown in not attempting to force ourselves on an unwilling world.

[Adapted from "International Language."]

DICKENS' "LIFE OF CHRIST" IN ESPERANTO!

The Esperanto Publishing Co. has issued a de luxe edition of this new work by the great Victorian. It is illustrated with reproductions from Raphael, Leonardi da Vinci and others.

Price 6/6, inc. postage from British Esperanto Assoc., 142 High Holborn, London, W.C1.

ADVANCED B.E.A. EXAMINATION.

The following regulations are now in force, but are not retrospective:—

1—That the Diploma Certificate continue to be printed in Esperanto, but that an English translation be provided.

2—That the title "Diplomito" be no longer given to candidates who pass by correspondence alone, but that success in the Correspondence Examination be equivalent only to success in the written part of the ordinary examination, and carry with it a special certificate of success in the Advanced Examination by Correspondence.

3—That the Diploma be granted only after success in both parts, but that, in conformity with paragraph 2 above, a candidate who has succeeded in the Correspondence Examination may take the oral part subsequently, and if successful, receive the Diploma.

4—That distinction may be awarded in either part.

5—That on the first occasion when the ordinary examination is attempted (and on every subsequent occasion when both parts are due to be taken through previous failure in both), both parts must be attempted, but that a candidate who fails in one part only

may enter for that part only on a subsequent occasion.

6—That the fee for either part of the ordinary examination be 2/6 at every attempt.

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF. (N-ro 10.)

Sinjoroj! Vane vi vidas en mi gloram reformatoron, kiu volas detruiri la bonan, ĉar li povas doni ion pli bonan. Por neniu el vi la ideo de lingvo tutmonda estas kaj povas esti tiel kara, kiel por mi. Mi kunkreskiĝis kun ĝi, mi kunligis kun ĝi mian tutan vivon, mi oferis al ĝi ĉion kion mi povis, mi multe pro ĝi suferis kaj suferas, kaj nenio min detenas de novaj oferoj, se mi scius, ke mi povas per ili servi al nia sankta afero. Elmontru al mi, ke la vojo, sur kiun vi vin jetis en la unua flama minuto, povas alkonduki nin al la celo—kaj mi la unua jetos mian laboron kaj aliĝos al vi. Se mi povus kredi, ke Volapuk havas eĉ la plej malgrandan eblon fariĝi iam lingvo de la mondo, mi neniam elpaŝus kun nova sistemo nur tial, ke ĝi estas en miaj okuloj pli bona; per mia tuta animo mi aliĝus al la Volapuk, malgraŭ ĝia arbitra kaj malfacila vortaro, malgraŭ la sovaĝeco de ĝiaj sonoj. Ĉar la eksperimentojn reformatorajn mi ĉiam tenis por danĝeraj por nia afero, ĝis ĝi ne tute ankoraŭ fortiĝis, kaj unuanimeco en nia afero estas laŭ mia opinio la unua kondiĉo, por ke la afero povu progresadi. Jes, sinjoroj: concordia parvae res crescunt, discordia maximae dilabuntur (1). Pli bone estas iri laŭ vojo, kiun alkondukos nin al la celo pli rapide.

(El nefinita traktaĵo en "La Esperantisto," 1889-1890; Vidu Originalan Verkaron, pp. 262-3.)

(1) Latina sentenco el Sallust. Per konsento malgrandaj aferoj kreskas; per malkonsento la plej grandaj falas en pecojn.—Red.

HOW WOULD WE LIKE IT?

A striking example of the injustice inflicted on the smaller nations by the commercial hegemony of three or four powerful nations is given in "Esperantobladet," the Norwegian Esperanto organ. It says: "The film Peer Gynt will be the greatest ever shown in Europe." Certainly! It is good that the greatest of films should have been the product of Norwegian poetry. But the triumph by no means compensates the Norwegian people for the indignity of seeing it shown in their own country in the language of another nation. Norwegians would rather see the film done in Esperanto."

PRI TRADUKAJ FUSOJ.

La germanoj diras ke ili nomis la armeon de generalo French "die verachtlich kleine Armee" (la malestiminde malgranda armeo) kaj ne "die verachtliche Armee" (la malestiminda malgran-

da armeo). Granda diferenco inter la adverbo kaj la adjektivo! La angla "psychological moment" estas mistraduko el la franca, siavice tradukaĵo de germana "das psychologische Moment". La vorto "Moment" signifas "momentumo," ne "tempero, momento" kaj do la angloj tute malguste uzas la esprimon dirvolante per ĝi "psikologie taŭga, ĝusta momento".

Momentumo (Fulcher & Long): forto de moviĝanta objekto. Matematike ĝi estas la produkto de la maso multiplikita de la rapido.

LINGVAJ NOTOJ.

"Vi estas tro bona kontraŭ mi" (George Dandin, 19a paĝo). Tiel Zamenhof tradukis "c'est trop de grace que vous me faites." Ŝajne, ke Zamenhof influis almenaŭ iome la Germana. Komparu ekz. "Seine Liebe gegen sie" (lia amo kontraŭ ŝi).

"For the reason that; because." "Tial, ke" estas ofte uzata anst. "ĉar." Vidu Marta'n 36/26, 170/27, 234/20; 1 Kor. 15/21. "Pro tio, ke" kaj "por tio, ke" estas uzata proks. en la sama senco: Marta 82/6, 141/4; Genezo 26/4-5; La Rabistoj 20/4; Sentencoj de Salomono 22/22. Notu ankaŭ "tial, ĉar" Fund. Krestomatia 245/31.

La neologismo "flako" estas el Franca "flaque" kaj signifas "pluva marĉeto."

La ĝusta uzo de "nek" kun kaj sen "ne".

Mi ne renkontis lin nek lian filon. Mi renkontis nek lin nek lian filon.

"Delikto," laŭ Plena Vortaro, estas "kontraŭleĝa puninda ago malpli grava ol krimo." Ekz. "nokte rajdi sur biciklo sen funkcia lumigilo estas delikto."

Zamenhof uzas "Gangeso" ĉe La Rabistoj p. 85 kaj "Gango" ĉe la pli poste eldonita verko Fabeloj de Andersens, Vol. 3, p. 12.

Miliono.—"La elspezoj ne superu la sumon de milion frankoj." Laŭ la Fundamento tiu frazo devas teksti "miliono da frankoj." "Lingva Kritiko," Dec., 1933, diris pri la demando: "La substantiveco de la numeraloj milion(o) kaj miliard(o) ofte prezentas gravan ĝenon. Ni salutis, se la Akademio foje esprimus sin favore al enkonduko de milion kaj miliard (same bilion, biliard, trilion, ktp.) ankaŭ kiel kardinalaj numeraloj."

CHRISTCHURCH "SUN" AND ESPERANTO.

On 30 June in the above paper was opened the Esperanto Corner, conducted by "Lady Gay." The method followed seems excellent. A typical letter from a New Zealand child is printed together with the Esperanto translation. Readers were asked to copy the latter and send it to the editor of the Corner, who promised to forward them to Japan. A different country will be chosen each month. In the "Sun" of 14 July we learn that some 500 of these Esperanto letters were

sent in and were duly despatched to Japan. We trust that this auspicious opening may not be blocked by lack of preparatory work, but that these young Esperantists will receive from their unseen Japanese friends responses to their communications. Our best wishes to this enterprise, so ably entered upon; its success should surely stimulate newspapers in Australia to follow its example.

DU VOĈOJ.

... mi, kiu povas pretendi amplekse posedi, en ĝiaj plej intimaj nuancoj kaj vortencoj, la lingvon de mia lando kaj miaj praavoj dum tri-kvar generacioj . . ."

(K. R. C. Sturmer, en Notlibro de Praktika Esperantisto.)

"Kara samideano, ĉu vi scias vian nacian lingvon?"

Jes? Akceptu do la esprimon de mia plej respekta (sed ne tute konvinkita) gratulo. Mi ja devas kun honto konfesi, ke mi ne estas tia klerulo, kiel vi! Kvankam de mia naskiĝo mi senĉese lernas la francan lingvon, mi tamen kun bedaŭro preskaŭ ĉiutage devas konstati, ke mi ankoraŭ ne plene scias ĝin—kaj sendube neniam ĝin sciigos perfekte. Neniam mi povas tre malproksimumi de gramatika libro, kiu staras sur breto de mia libroŝranko. Koncerne la vortaron, neeble eĉ estas havi ĝin en la libroŝranko; ĝi nepre devas kuŝi sur mia skribotablo mem, tuj "sub la mano," ĉar preskaŭ ĉiutage mi devas serĉi en ĝi la "ĝustan kaj precizan" sencion de iu franca vorto."

(D-ro Pierre Corret, en Franca Esperantisto, Junio, 1934.)

MORTIĜITA EN BATALO?

El la libro "Warrior" (Militisto), de Leŭt.-Kol. Hutchinson: "Kun mia adjuŝtanta mi surprizis en drinkejo amason da postgintoj, freneze ebriaj. Ni elpelis ilin, kaj direktante sur ilin maŝinpaŝilon, igis ilin avanci kontraŭ la malamikon. Ili pereis, eĉ la lasta viro."

"Tiel dangerkriza estis la situacio je certa tempo de la germana avanco de 1918, ke mi ordonis miajn baterisergentojn, ke se ili vidos britajn trupojn retiriĝi cede al la malamiko, ili surpafu la forkurantojn; apud la muelejo mi vidis miajn artileriistojn fordetruiti platonon (1) de regimento kiu panike penis sin savi."

(1) Fulcher kaj Long: A. platoon; F. peloton.

"RONDA" CIFERO.

La interligilo de la Internacia Proleta Kooperado "Fajrero" n-ro 14 (majo) represas la informon de aŭstralia "Laborista Esperantisto" sub rubriko "Disaĵoj" (?), ke en Harkovo ekzistas 10,500 esperantistoj. Kvankam ni tre ĝojus, se tiu ĉi miriga cifero baziĝus sur fakto, ni tamen timas, ke la vizitinto portis en sia notlibro du nulojn troajn.

(H.P. en "Sennaciulo.")

RECENZOJ.

Notlibro de **Praktika Esperantisto**: K. R. C. Sturmer, eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt; agento ĉe ni. 130 pĝ. Broŝ. 3/3; bind. 5/-, plus 10% afranko.

Pli-malpli ĉarma sinmalkovro de liberesprima intelektulo, kies original-eco aŭ pensa malstabilo ne permesas al li ankriĝi en unu el la miriada de ekzistantaj sektaj aŭ ismoj. Tiam kaj tiam donante informojn E. historie interesajn aŭ valorajn, li stimule pri-ŭtas interalie Bertrand Russell, W. T. Stead, de Beaufront, Zamenhof, mil-ton, arton, homorojn, lingvajn nuan-cojn kaj la E. movadon. La libro ĉiupaĝe elspiras la spiriton de homo tute ne ĝenata de ajna bridanta sento de l' modesto. Jen kaj jen li direktas la lumradion sur la proprajn kompeten-tojn, bele substrekas la proprajn maj-sferecojn, ne fidante atendi tion de aliaj plumoj. Studento de la erotikisma skolo en la Franca kaj Angla litera-turoj, kaj eble-ekcesa admiranto de la malpuritane sprita Schwartz li kon-stante revenadas al unu el siaj "ama-taj ĉevaloj": la amaja vivo. Pri-skribante certajn nebelajn flankojn de la sekse vivo, li montras sin observema, sed mi preferus nomi "facilmor(al)aj," ne "larĝmensaj," certajn rondojn en kiuj li flar-elserĉis iom el la ne tre bonodora materialo.

Multaj ne konsentos konstatojn de Sturmer, preferante rigardi nematura kaj ankoraŭ formiĝanta la vivkoncep-ton kiu igis lin tiajn eldiri; tamen, tiuj legantoj ne povos ne admiri la sincere-con de la aŭtoro, kiu tiel nudigas la propran animon en la kredo, ke per tio li pionirece frontas problemojn evitatajn de la ordinara homoj.

Lingve tede la evidenta trudo de "ĉeso." Zamenhof, p. 411 de Origin-ala Verkaro, uzis "atmosfera" en sen-co: spirito de loko. "Aprezi" Sturmer povus anstataŭigi per "ŝati" aŭ "valor-taksi" laŭ nuanco. "Sorbi sin" estas rekta eraro por "sorbiĝi." "Taŭgeco por" (al). La lingvaĵo estas tre facile legata, sed ni konsentas kun almenaŭ unu aserto de nia eble tro sinesplorema amiko, kiam li naive plendas, ke mal-graŭ sia verkista talento (p. 112) li "ĝeniam influos nian lingvon kiel iu Baghy aŭ Kalocsay" (p. 9). Ni kon-silus, ke Sturmer kontentiĝu kun tio, esti "laŭdata pro sia Zamenhofs stilo" (p. 66), kaj lasu aliajn laŭrojn al aliaj plumoj, sciante, ke la du nomitaj maj-stroj jam plugis kampojn sur Parnaso kaj aliloke kiujn ankoraŭ li ne vidis.

Disputemiga, sed ankaŭ verkore simpatia, kiel ekz. en la belaj linioj pri la tute diferenckarakterata Butler, la libro estas ĉiam interesa, kaj prezentas al ni la bildon de rimarkinda, eĉ stran-ĝa personeco. (ROBO.)

"Fine mi komprenas la Radion": ver-kita originale en Esperanto, de A. Aisberg. Eld. Literatura Mondo Budapeŝt. Agento ĉe ni. Pĝj. 140. prezo 6 ŝil.

Jen sub formo de dialogo inter patro kaj filo la misteroj de la radio klariĝas

por la serĉanto. Ĉi tiu verko jam tra-dukiĝis en 13 lingvojn. Ridokajuzaj bildetoj kaj facila humoro gajigas la tekston, kaj malpezigas la cetera nee-viteblan teknikecon.

VARIA.

"Philology appears to me to be among the most futile of sciences, since, meantime, a study of it enables no one to do anything with language. If philologists were given authority to alter and direct it, they might be able to prevent many of the crudities which creep in and which they deplore."

(J. B. Conchie, in "John o' London's Weekly" for June 2.)

Interesa Eltrovo: Antaŭ nelonge tro-viĝis nekonita manuskripto de Prus, fama pola aŭtoro de La Faraono, kiun tradukis en E-on d-ro Kazimiro Bein (Kabe). Laŭinforme tiu manuskripto prezentas la finon al la supra verko, kiu siatempe pro cenzuro ne povis esti publikigita.

Kiu firmo la plej longe reklamas en Esperanto? Nia-scie Buchanan, Scott and K-io, Glasgow, kiu liveris la oficia-lan viskion de la Tria Kongreso (1907), kaj ĉu eĉ antaŭe? Ĝiaj viskijaj kaj cigaredaj reklamoj ankoraŭ aperas en "The British Esperantist."

"Jes, diris la hirurgo, dum la milito mi notis ankaŭ kelkajn interesajn psi-kiatriajn observojn: ekzemple venis antaŭ min japana soldato kiu frene-zigiĝis sur la batalkampoj—li havis la fik-san ideon, ke li scias, kial li batalas."

(El "Vojaĝo en Faremidon.")

NIA POSTO.

B. en H. "Ĥemio" kaj "Ĥaoso" estas vortoj de la Fundamento (Univ-ersala Vortaro), de estas tre konsilinde, uzi ilin prefere al la formoj kun K. Cetera la litero H estos neniam forigebla, ĉar ni devos ĉiam ĝin reteni ĉe Holero, Ĥoro, kaj por transliterumi vortojn el la Greka enhavatajn la lit-eron X gorgsonan, kaj certajn el la Rusa kaj aliaj lingvoj.

H. en To. "To pass an exam." Millidge: "sukcese plenumi ekzamenon" "(Ili) faris sian ekzamenigon tiel bone, ke ili ricevis la noton." (Fabeloj de Andersen, vol. I, p. 135); Ankaŭ bone estas: trapasi (Zamenhof), transpasi, sukcesi ekzamenon; sukcese ekzameniĝi "To present oneself for exam." "Li stariĝis al la ekzameno, kaj ne suk-cesis (La Gimnazio, p. 53, ankaŭ p. 56, trad. Zam.); iri ekzameniĝi.

RELATIVECO.

Unu tagon la konata verkisto X. pre-zentis min al amiko sia: "Jen felica sin-joro kiu, dum mi parolas nur unu solan, scipovas dek lingvojn."—"Vi ne bone klarigas la aferon," korektis li, "ĉar kontraŭe, mi estas bedaŭrinda homo kiu, el la 2976, laŭ la statistiko, en la mondo ekzistantaj lingvoj, parolas nur dek."

(Fischer-Galatz.)

HINDENBURG KAJ LA JUDOJ.

Laŭ "Nia Gazeto," Nice, Hinden-burg en 1928j. diris la jenon en inter-vjuo kun la amerika ĵurnalisto Mir-jam Sterne:—

"Estas malagrabla al mi aŭdi ion similan . . . Mi ne scias, kio povis naski similan opinionon (1) pri mi . . . Dum la tuta pasinteco, dum mia tuta militista kariero kaj en la privata vivo mi ne donis kaŭzon al tia opiniado . . . Mi konas tre bone la ecojn de via raso . . . Germanoj estas fieraj, ke unu el la plej lumaj spiritoj, Alberto Ein-stein, estas nia civitano . . . Mi ja ne bezonas akcenti, ke viaj samreligiaj ludis gravan rolon en la disvolvo de la germana kulturo . . . Kun plena primedito mi donas al vi tiun interv-juon, kvankam principe mi donas al la gazetaro neniam konfesojn."

(1) Nome, ke li ne havas simpatian al la judoj.

Eraro.—Paĝo 122, la kolono. "Al-hemisto" (legu: alhemiisto, aŭ alhemi-ulo).

Nigrulon Simŝo dungis la estro de menaĝerio.

Post ne longe ĉi tiu ordonis, ke li purigu la leonkaĝon.

Respondis Simŝo: "Ho ne, moŝto mia. Mi neniel emas kunmiksi min kun la leonoj."

"Sed, Simŝo", diris la estro, "ĉu vi ne scias, ke ĉi tiu leono estas maljuna kaj tute sen dentoj? Eĉ se ĝi volus, ĝi ne povus vin mordi".

"Tio povas esti, moŝto mia," respondis Simŝo, "tamen mi opinias, ke ĝi ank-oraŭ poveblas doni al mi teruran eksuŝon".

HOW DO YOU DO?

Franco: Kiel vi iras? Germane: Kiel vi trovas vin? Angle: Kiel vi faras? Itale: Kiel vi tenas vin? Ruse kaj Nederlande: Kiel vi vivas? Svede: Kiel vi povas? Ĥine: Kion faras via stomako; ĉu vi manĝis vian rizon? Egipte: Kia estas via stato? Perse: Via ombro neniam malgrandiĝu! Es-perante: Kiel vi fartas (sanas aŭ sta-tas)?

La verbo "farti" estas samdevena kiel Angla "to fare," nome de Mal-novangla "faran"—iri, esti en certa stato. Zamenhof supozinde enmetis la literon "t" pro ĵama ekzisto de radikoj "far".

ESPERANTO RADIO LESSONS.

Esperanto lessons will be broadcast from 3LO (Melbourne) on every al-ternate Saturday at 6.15 p.m.

next lesson will be given on 9

PARALLEL TRANSLATION.

Grava Anonco.

La 22-a Japana Esperanta Kongreso, en Nagasaki, 1934, aprobis la proponon de nia Esperanto-Propaganda Asocio, ke oni fondu preparan komitaton por enkonduko de Esperanto en mezgradajn lernejojn de Japanujo. Re prezentante la komitaton, ni turnas nin al vi por viaj konsiloj kaj helpoj, —sen kiuj malfacila estas la atingo de nia granda celo.

Jam ĉ. duoncentjaro forpasis de kiam Japanujo enkondukis la anglan lingvon kiel devigan en la lernejojn, kaj tamen la rezultato ĉiam restas nekontentiga. Ni, la japana Esperantistaro, forte deziras reformi tian lernejan sistemon: anstataŭigi la anglan lingvon per Esperanto.

Por antaŭenpuŝi nian intencon ni devas antaŭ ĉio kolekti multajn materialojn por instigo kaj komprenigo al la publiko, kaj ankaŭ prepari, sufiĉe frue, tekstlibrojn konsistantajn el kvin volumoj (ĉar japanaj liceoj konsistas el kvin klasoj). Ni devas konsideri ankaŭ pri la dispono de la nunaj instruistoj de angla lingvo, por ke ili ne perdu subite sian oficon, kiam la japana registaro enkondukos nian lingvon en liceojn kun sankcio al nia propono.

Jen estas la resumo pri nia helpopeto al vi. Ni tre sincere petas al vi, ke vi bonvolu doni al ni kiel eble plej detalajn informojn kaj materialojn:—

1. Kiuj lernejoj en via lando jam enkondukis Esperanton, kaj de kiam?
2. Kiajn tekstlibrojn ili uzas? Ĉu nia komitato povus ricevi ilin?
3. El kiom da klasoj konsistas la Esperanta lernado?
4. Ĉu la lernado estas deviga aŭ libera?
5. Kia estas la rezultato en tiu aŭ alia lernejo?

—ESPERANTO-PROPAGANDA ASOCIO,
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Important Announcement.

The 22nd Japanese Esperanto Congress, Nagasaki, 1934, accepted the proposal of our Esperanto Propaganda Association that there be founded a preparatory committee for the introduction of Esperanto into the intermediate schools of Japan. Representing the committee we therefore turn to you for your counsel and help, without which the attaining of our great goal will be difficult.

More than 50 years have passed since Japan introduced as compulsory the teaching of English in the schools, and still the results are unsatisfactory. We, the Japanese Esperantists, strongly desire to reform such a system—by displacing English by Esperanto.

To forward our intention we must first and foremost collect all the material we can for the purpose of enlightening and inspiring public opinion, and also prepare as early as possible five graded textbooks (for Japanese schools are of five classes). Another thing we must consider is the position of those at present teaching English, in order that they do not suddenly lose their appointments when the Japanese Government, having sanctioned our proposal, shall introduce Esperanto into the high schools.

Here, in brief, is our request to you. We sincerely ask that you kindly forward us, as detailed as possible, answers to the following:—

1. Which schools in your country have introduced Esperanto, and since when?
2. What textbooks do they use? Could our committee be supplied with them?
3. What number of classes are embraced by the Esperanto courses?
4. Is the teaching compulsory or optional?
5. What have been the results in the different classes?

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA.

TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:—Mr. D. B. Thomson, 4/6, Apl., '35; West Australian Esp. Society, 4/6, Jan., '35; Mr. D. Guilbert, 4/6, July, '35; Mr. H. N. Love, 4/6, Jan., '35; Melb. Esp. Club (subs.), June, 20/-; Mr. Dornbusch, 4/6, July, '35; Mr. Dornbusch, 4/6, July, '35 (additional sub.); Miss Bell, 4/6, July, '35; Miss Searle, 4/6, Sept., '35; Melb. Esp. Club (subs.), July, 32/-; Mr. H. H. Hutton, 4/6, July, '35; Miss Conwell, 4/6, May, '35; Miss Hopton, 4/6, June, '35; Mrs. Wilson, 4/6, June, '34; Mr. Waterman, 4/6, July, '35; Coburg Esp. Club (sales), 1/6; Mr. Saar, 4/6, Aug., '36; Adelaide Esp. Club (sales), 10/-; Mr. Ravelich, 4/6, May, '36; Mr. Byatt, 4/6, July, '35; Mr. Krass, 5d.; Miss Chisholm, 8d.; Mrs. Trewin, 4/6, Aug., '35; Mr. Schubert, 2/3, Dec., '34.

Melbourne Esperanto Club.—Wednesdays, 8 p.m., Australian Church Hall, Russell-st., Melb. Mr. R. Rawson, 169 Exhibition-st.

Melbourne Esperanto Society.—Tuesdays, 8 p.m., Scots Church Hall, 97 Russell-st., Melb. Secretary, Miss L. Irwin, Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

Coburg Esperanto Club.—Thursdays, 8 p.m., Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Secretary, Mr. A. Spencer, 48 Munro-st., Coburg.

Sydney Esperanto Society.—Thursdays, 8 p.m., 2nd Floor, Manning Bldg., 449 Pitt-st., Sydney. Secretary, Mr. L. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto Society.—2nd and 4th Tuesdays in each month. State Service Union Room, 59a Elizabeth-st. Secretary and president, Mr. L. Parry.

Adelaide Esperanto Club.—Thursdays, 7.45 p.m., Y.M.C.A. Bldg., Hindmarsh Square, Adelaide. Secretary, Mr. F. Droop, 13 Chatsworth-grove, Toorak Gardens.

Westralian Esperanto Society (Perth).—Meets every week. Secretary, Mr. D. Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth.


New Zealand Esperanto Association.

—Headquarters of the international language movement in New Zealand. Patrons: Sir George Fowlds, C.B.E., Auckland, and Prof. J. Macmillan Brown, Christchurch, Chancellor of the New Zealand University. President Mr. W. L. Edmanson; Vice-pres; Mr. C. Brandon, Auckland, Mr. H. E. Facer, Palmerston North, Mr. A. Dewar, Masterton, and Mr. L. A. Eford, Christchurch. Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Wellington; Hon. Secretary, Mr. Wm. H. King (Room 106 G.P.O. Bldg., Wellington, C.I.). Operations: Propagating Esperanto; arranging annual congresses; conduct of correspondence courses; supplying information etc.

New Zealand.

Wellington Esperanto Club.—Mondays, 8 p.m., Y.M.C.A., Willis-st., Wellington. Prez., s-ro Vernon Leck; vicprez., f-ino Coralie Smythson, D.B.E.A.; kasisto, s-ro L. E. Dust, D.B.E.A.; sek-io, C. T. Cooch, Box 390, Wellington.

Auckland Esperanto Society.—Mondays, 7.30 p.m., New Church Hall, Newton-rd. Communications president, Mr. J. Russell, 2 Pukentui-rd., Epsom.



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

63 SCOTT ST., MOONEE PONDS, W4, VICTORIA.

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj — Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo—12 linioj: 3 ŝilingoj.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 165 (15th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

12 OKTOBRO, 1934.

MORITURI TE SALUTANT.

La Nuna Numero Estas La Finlasta! La Suda Kruco Mortis.

THE "SUDA"-PASSES.

With this number "La Suda Kruco," founded in July, 1920, ceases publication through insufficient support.

Since April, 1929, when Mr. P. Hudson ceased to guide the gazette, your editor has given continual thought and labor to the matter of establishing the paper as a self-supporting concern.

In October of 1932 he joined forces with Mr. R. Rawson and his colleagues, in the hope that by a bold forward move in doubling the paper he might draw nearer this goal. In spite of the best endeavor of all concerned there was failure to hold the new position.

The ceasing of the S.K., it must be made clear, is due to peculiarly local conditions, and in no way reflects the state of the Esperanto movement generally. Esperanto is more and more influencing the life and thought of Europe, and, through Europe, the world.

One day there may displace the present "gaseous invertebrate" a real A.E.A., a body firmly linking by a generously produced official organ, the Esperantists of six States and N.Z. Then, and not till then, will it be practicable to issue an Esperanto gazette in this peculiar-conditioned country without constant anxiety as to its regular and sustained publication. Should such an association experience, as we to-day, times of nation-wide difficulty, any deficit on the year would be met by a small levy on each member. The organ of the Australian Es-

peranto movement in that day would depend no longer on the undivided responsibility and limited means of a few persons. It would rest on the willing shoulders of, I dare to write, thousands of aim-conscious workers throughout this hemisphere.

There may be those to whom the payment of advance subscription has entailed certain sacrifice. To these we would suggest that they approach us, if they so desire, to the end that we refund their money.

"La Suda Kruco," while it lived, lived usefully; it will not have died in vain if, for those that shall follow on, its thirteen years' experience of battle may serve as a light on the dark, winding way that leads surely to our goal.

R. BANHAM, Editor.

AL NIAJ ALILANDAJ
KOLEGOJ!

Jen la lasta numero! Pro monmanko ni devis ĉesigi aperon de nia amata organo. Akceptu esprimon de nia danko pro via ĉiame afabla kaj komplezema sinteno al ni. Denove dankon!

R. Banham, 63 Scott Str., Moonee Ponds, W4, Victoria, Australia (konstanta adreso).

VARIA.

El la Oficiala Dokumentaro de I.C.K.:

"Ni ne ricevis raporton pri la aktiveco de la Aŭstralazia Esperantista

Asocio, sed rekte informis nin per La Suda Kruco pri la agado de niaj tiaj samideanoj."

Skribas s-ro Wm. Bailey, L.A., pri la interpunkcio:—

"Mi opinias, ke la Zamenhofs sistemo estas pli bona gvidilo, ol la naciaj lingvoj. Kiam Z. eldonis sian Lingvan Respondon pri tiu temo, ni ne havis multe da Zamenhofs materialo, sed nun ni havas grandan kvanton. Anstataŭ konstrui dubesignifajn frazojn kaj kruci arbitrajn difarencigojn per nova sistemo de interpunkcio, skribu klarsignife:

Mi ne amas bruemajn (bruantajn) infanojn (konforme al la modela frazo 'Mi ne amas obstinajn homojn,' Ekzer-caro par. 10, 7). Por la dua senco vi povas uzi: 'Mi ne amas tiujn bruemajn (bruantajn) infanojn.'

En kelkaj detaloj la zamenhofs sistemo ne estas tute konsekvenca, sed alifer ŝ pri la komo antaŭ rilataj pronomoj lia metodo estas konstatebla sen malfacileco." (16 Julio, 1934.)

EL POLA PLUMO.

Esperanto—la plej taŭga traduklingvo.

Kontraŭuloj de esperanto (la plej danĝeraj—konantaj ĝin iom) riproĉas ofte la internaciajn lingvon, esti malkapabla speguli traduke lingvajn belajojn de originala literaturo. Ili estas nur tiam pravaj, kiam iliaj riproĉparoloj koncernas verkojn skribitajn en popolaj idiomoj. Ekz. monaŭtaj noveloj de

136. aŭ Orkan kun ilia speciala kaj sukhava stilo restos (malĉiuj ĉidirekte noblaj provoj) por ĉi ĉi Sezamo fermita al tiuj, al kiuj fremda estas lingvo de l' pola popolo.

Sed estimataj riproĉuloj, nekredemaj Tomaso, ĉu oni povus senpune vesti ĉi infanojn de l' montaro en francan, germanan aŭ anglan veston? Centioje ne! Sed ni ne forgesu, ke tiuspecaj verkoj estas nur ereto de nacia literaturo. La tutaĵo de ĝi estas bonege tradukebla en Zamenhofan lingvon. Esperanto povas ludi, dank' al sia vortriĉeco kaj fleksebleco, rolon de spegulego, en kiu ĉiu literaturo nacia vidas sian propran, kvankam nur spegulitan, vizaĝon. Estus eĉ rimarkinde dum tradukado de originalaj verkoj konservi kiel eble plej (en limoj de l' „Fundamento de esperanto“) la stilon de koncerna aŭtoro kun ĝiaj tipaĵoj kaj strangaĵoj, por ke neniu juvelo de ĝi perdiĝu kaj por ke la imago de legantaro pri valoroj de la verko estu la ĝusta. Ke Esperanto estas pleje kaj plene taŭga por ĉi celo pravas fakto, ke pli facile estas traduki (por tradukisto, ne lernanto) el nacia lingvo en internacian ol kontraŭe. Nome en unua kazo estas ebla preskaŭ laŭvorta traduko, sen malutilo al esperanta bonstilo, kaj en la dua ni devas tro multloke eviti laŭvortecon de Esperantaĵo. Mi atentigas tamen, ke ĉi rimarkoj temas prozon ne poezion.

Lena (en "Pola Esperantisto.")

LA ESPERANTA BIBLIO.

Skribante pri la stranga "ili loĝis tie ĉirkaŭ dek jaroj," ĉe Rut 1, 4, formo ~~maia~~ al la Zamenhovia uzado, amiko petas:

"Mi aŭdis aŭ legis, ke dum la milito kaj antaŭ la morto de Zam., la manuskripto de la Biblio estis sendita al Anglujo el Polujo kun la permeso de Germanujo. Mi ne scias, al kiu oni sendis ĝin, kaj kun kiaj postuloj. En Skotlando oni diris al mi, ke Zam. poste deziris, ke iu komitato reviziu lian tradukon. Mi esperas, ke vi petos, ke oni donu plenan informon al la E-istaro."

KRISTANECO KAJ BREDŝAFOJ.

Kara Suda:—Mi naskiĝis Brito; benriĉa afero por mi! Vivu Britujo! Ĉar mi naskiĝis Brito, al mi oni instruis la dian Kriston, de Kiu devenas la nobla kaj sindona spirito de la Britimperio. Mi lernis, do, distingi inter la gvindanta anĝeleco de la Brita Imperio, kaj la "Britimperiismo, aŭ ŝovinismo de kelkaj malkristecaj atavismuloj. Mi lernis fidi la malavarecon, ne la avidemon. Mi lernis, ke tiu posedas jam deko, kiu fordonas laŭ la Krista fervoro. Nu, la Japanoj deziras de Aŭstralio bredŝafojn. Atentu! Jen kian malindan bruegon elvokis tiu peto! Eĉ de la ĵurnalo kiu samtempe fanfarone eldonas tra la lando la plenan

rakonton pri la Kristo verkitan de la glora Dickens. Ho, kia fia blekaĉo! "Ni neniel volas fordoni el niaj bredŝafoj, pro timo, ke ni malriĉiĝu!" Kaj la nuna Britimperio nuntempe subtenas la pseŭdokristajn britaĉojn kaj perŝadas sian rolon de gvidanta anĝelo. Sed kial? Ĉu iu el viaj legantoj povas klarigi al mi tian senhonoran egoismon?

—Via J. Eliot.

PRIEST WHO MUST DO MANUAL WORK.

In a little house in Surry Hills lives Father Innocent Serisev, a Russian priest and remarkable personality.

Years ago, he was a teacher of religion in Russian schools, but the Bolsheviks deprived him of this livelihood. Heartbroken, he and his wife and child went to China and Japan, where they spent several years.

One of the world's leading authorities on Esperanto, Father Serisev was for some time professor of that language at the University of Peking. He also taught religion at Harbin, Manchuria. Again he had to leave owing to Communist interference.

More than eight years ago, he reached Australia and started to minister to the small, scattered Russian community in Sydney.

His Sydney parishioners are too poor to pay a regular stipend for his services, and Father Serisev has to support himself and his family by manual work, his wife contributing a little each week by scrubbing floors and cleaning offices.

Father Serisev has worked in a hospital during the day, editing at night three Russian magazines, one of which circulates in ten countries, ranging from Norway to Japan. (Sydney "Sunday Sun," 9/1/34.)

PRI W. T. STEAD.

Sur P. 39 de Notlibro de Praktika E-isto Sturmer nomas Stead-on "pioniro de E-o en Britujo, kiu tamen neniam lernis la lingvon—mi mem vidis leterojn de Couturat al li el jaro 1908 en franca lingvo, kaj kopion de letero lia al Couturat en angla lingvo."

Ĉu vere ni devas kredi, ke Stead, kiu, laŭ Ad. Šefer in "Danubo" (Majo 1912) ebligis la enkondukon de E-o en Londonon, donacis monon, pruntis kunvenejojn, fondis la unuan britan gazeton, The Esperantist, kaj alimaniere malavare helpis la movadon, tute ne povis uzi mem la lingvon tiel karan por sia koro? Ankaŭ kiel klarigi la citon el recenzo lia en The Review of Reviews? Temas pri "Paul Debenham" (Luyken), kaj Stead skribis pri tiu ĉi originala E-a verko—"tiu ĉarmega romano"! Kiel li konstatis ĝin ĉarmega, se efektive li ne povocis E-on?

RECENZOJ.

Enciklopedio de Esperanto. Vol. 1. A-J. Redaktis L. Kokeny kaj V. Bleier. La lingvo-fakon K. Kalocsay. Inicia-tinto-ĉefredaktoro I. Sirjaev. Kunlaborantoj entute 107 konataj esperantistoj el ĉiuj tendencoj de la movado. Sur 272 dense presitaj tekstopaĝoj preskaŭ 1100 titolvortoj kaj sur 112 bildopaĝoj preskaŭ 300 bildoj. Presita sur senligna papero. Prezo kun la baldaŭ aperonta dua volumo, kiu enhavos proksimume 350 teksto kaj 160 bildopaĝojn, broŝ. svfr. 30.-, bind. svfr. 34.- plus 10% por sendkostoj. Pagebla en du partoj. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt. Novaj membroj de AELA en 1934, pagas por ĝi nur svfr. 14.- broŝ. kaj svfr. 16. bindita kaj afrankita agento ĉe ni.

Ĉi verko prenas rangon kun la giganta laboro de Wuster kaj la Bibliografio de Stojan kiel unu el la tri plej grandaj fortostreĉoj de nia kompila literaturo. Ke ĝi povis esti eldonita en tempoj, kiaj la nunaj, atestas en la plej elokventa lingvo al la sindona kaj persista karaktero de tiu brava areto da idealistoj-praktikistoj, kies centro sidas en Budapeŝt. Spaco ne disponas ĉi tie por nuraj laŭdoj; ni simple diru, kun ĉia sincero, ke la enciklopedio estas zorge honeste farita kaj meritas aĉeton kaj uzadon de ĉiu E-isto avida igi sin kompetenta defendi aŭ propagandi E-on en iu(j) el la diversaj rondoj. Almenaŭ ĉiu klubo povus ĝin akiri per la konataj rimedoj, malgraŭ ĝia konsiderinda sed tute ne troa prezo.

La verko pritraktas individuojn (1500), asociojn, E. landhistoriojn, librojn (450) kaj lingvajn demandojn. Malgraŭ ia nekongruenco en verko principe kronika, fakraporta, tre plaĉas tio, ke troviĝas notoj pri elstaraj gramatikaj demandoj kaj strukturo de E-o. Ekzemple, tiu pri la aglutina karaktero de nia lingvo provizas detruan municion por defendbatalo kontraŭ la pure Latinecaj projektoj.

Kelkaj el la fotobildoj estas aparte interesaj kaj eĉ valoraj; ekz. tiuj de la Unua Kongreso en Boulogne kaj la maloftaj de pasintaj pioniroj, dum neakseble havindaj estas la longaj artikoloj pri la eminentuloj kaj pri specialaj temoj, kiaj la Delegacio, Ido, E. geedziĝoj, Fundamento de E., Historio de Int. Lingvo.

Rimarkoj: En la artikolo pri Aŭstralio la nomoj de John Booth, Geo. Collingridge, Cedric White kaj D-ro Barrington nepre devus aperi, jam ne parolante pri kelkaj ankoraŭ vivantaj pioniroj de E. en ĉi lando.

En la gazetklišo 201 La Suda Krucio mismetiĝis. La titolbloko montrita en 201 aperis kun la n-ro 145, Okt., 1932.

Sub Filatelio neniam pri la E. poŝtmarkoj. Supoze, ni trovos tion sub Poŝto. George Gordon naskiĝis en Gorey (ne Gorex).

Malgraŭ ĝiaj mankoj, neeviteblaj en tia miriadbranca entrepreno, ĉi Enciklopedio staras masiva monumento al fera sindediĉo kaj vastskala reserĉo. Kiel akcelilon al la ĝenerala avanco, ĝin ni ne povas tro alte taksi.

Amo de Toojuuroo kaj Du Aliaj Teatraĵoj: de Kan Kikuci. Trad. el la Japana de J. Simomura. Eld. Literatura Mondo. Agento ĉe ni. 88-paĝa, prezo 2ŝ.

Kompare kun la sendube konsiderinda disvastiĝo de E-o inter la Japanoj, la pure literatura E-a eldonitaĵo ĝis nun veninta el ilia lando relative mizeras. Indas menciion nur Deklaracio kaj la unua vol. de Ora Masko, krom unu-du mallongaj pecoj. Sed nun eliras per niaj nelacigeblaj hungaraj amikoj tri teatraĵoj, el kiu la meza, "Pli bone ol venĝi," estas elstare la plej frapa. La unua, "Amo de T." rakontas, al la recenzanto, la kruelan indiferenton de fama aktoro de amajistaj roloj, kiu malvarmsange vidas mortigi sin la edzinon de alia, post tio ke li uzis ŝin amindume por pliperfektigi la propran arton.

La tria, "La Miraklo," spegulas la putriĝon de la tradicia Budaismo. La cinika lingvaĵo de la nekredanta Ŝukan kaj lia moka alkraĉo al la sankta idolo rememorigas nin pri Juĝistoj 6,25-32; I Reĝoj, 18 ĉap. 27 v.; el kio ni vidas la antikvajjn Izraelidojn antaŭ 2,000 jaroj atingi evoluŝtupon nun alvenatan de la ĝis nun tradicie pensantaj Japanoj.

La meza, jen la perlo. Forte drameca, ĝi komenciĝas per murdo de mastro fare de servisto Iĉikuroo. Tiun ĉi instigadas al krimo lia megero-kunulino (1) Ojumi. Ili fuĝas en montojn, kaj tie perrabe vivas. Tiam la sceno ŝanĝiĝas. Iĉikuroo konvertiĝas al alta idealo de porhomara servo; penas forviŝi la ĉefkrimon, laborante permane fosegi tunelon tra rokomo, kun celo savi vivojn ĝis tiam perdatajn pro neceso transpasi abismon per danĝera svingponto. Trovas lin Jicunosuke, la venĝon-serĉanta filo de la murdito. La naturo de la krizo kiu sekvas el ĉi renkonto de du flamaj animoj, kaj la intenson de la streĉo kiun sentas la leganto dum li finas la katenantan verkon, ni prefere ne malkovras.

Ĉu Kikuci studis Ŝekspiron? La malbonspirita Ojumi, puŝanta la manon de Iĉikuroo en ankoraŭ pluan sangon, forte pensigas pri Lady Macbeth; la sceno en la kaverno, kiam la juste kolera filo piedfingre alpaŝas la preĝantan Iĉikuroo, povus esti inspirita de la simila en Hamleto, kiam la reĝido detenas la punpretan manon (Sc. 3, akto 3).

Rimarkoj: "T., rigardas Okaji'n kuŝantan tie plorante (plorantan); aktuala sperto por ludi rolon (efektiva sperto... du-folda (du-falda); kompatinde (bedaŭrinde) li estis rabita; nenio helpas (ĝi ne povas esti evitata); lasi lin morti senutile (? senhelpe); alies (tre utila formo, sed nefundamenta); 82, mezo (meso). Neniaj notoj pri kriptomeria (Crytomeria Japonica); katamito, karadrio, paŭlovnia, kariko, ĵelio (A. jelly). Kiel oni traduku la libron en nacian lingvon, ne sciante kion signifas tiaj enigmaĵoj?

(1) Nomo de unu el la tri Furioj en greka mitologio; diableca virinaĉo.

Skizo pri Filozofio de la Homa Digno, de Paul Gille, prof-o ĉe la Belgia Inst. por Altaj Studoj. Trad. el la Franca de E. Lanti. Eld. S.A.T., 67 avenue Gambetta, Parizo 20. Prezo 3 ŝil. pĝj. 148.

Ĉu la homoj, laŭ Paskal, havas la dignon de kaŭzeco, la povon iniciati, aŭ ĉu ili estas sklavo, automatotaj movataj de la blindaj fortoj de la ekonomio? Diras Lanti en la antaŭparolo: "La verkaro de Marks kaj Engels enhavas multon ĝustan laŭ ekonomia vidpunkto. Sed aliflanke estas tute vere, ke ju pli mi enprofundiĝas en la studado de marksisma literaturo, des pli mi konvinkiĝas, ke la ekonomiaj faktoroj ne sufiĉas por klarigi ĉiujn okazintaĵojn, por komprenigi la sintenon de l'homoj en diversaj cirkonstancoj de l'vivo."

Ĉar diris Marks, resumante sian kredon pri la demando: "La produktomaniero de l'materiala vivo kondiĉas, in-globo (L. maldetale), la socian, politikan kaj intelektan procezon de l'vivo. Ne la konscio de l'homoj determinas ilian staton, sed male ilia socia stato determinas ilian konscion."

Tiun aserton Gille rebatas. Citante Reclus, li kontraŭmetas, ke la ideoj faras la socian kaj regas la mondon. Kompreneble, ke la ideoj ricevas la premon de la ekonomiaj kondiĉoj. Kaj tiu premo estas ordinare tia, ke oni povas diri, ke, en sia tuto, la kolektiva vivo dependas de ĝi. Ĝi dependas de la ekonomiaj kondiĉoj, sed ĝi ne fluas el ili kiel el sia fonto. Ĉi tiu lasta restas, malgraŭ la diro de Engels, "en la kapo de la homoj." Kaj ni povas vidi sur ĉiuj kampoj de l'vivo, ke la relativa sendependeco de la ideoj, rilate al la ekonomiaj kondiĉoj, montras siajn efikojn.

Pludiras Gille: La religia sento certe estas tute alia afero, ol la "ekonomia bezono renversita" kaj serĉanta en ~~imaga transmondo-kontentigojn~~, kiuj mankas al ĝi sur ĉi tiu tero. Ĉu estas permeseble aserti, ke la predikado de Jesuo el Nazareto aŭ tiu de la Budo estis nur la rezulto de teknika revolucio, de "metamorfozo de l'produktado kaj intersanĝado"? Absurda estas la perekonomia klarigo pri la religioj kaj filozofioj.

La temo postulas cerbostreĉon; ĝi ne estas poramuza, pordistra. Sed la traduko estas inda je Lanti, kiu sin montras egale lingvolerta kaj klare-sprama en la malfacila medio, kiel en la naiva rakontostilo de "Kandid." La verko de Gille estos legata kun plaĉo de tiuj, kies prihistorian senton ne kontentigas la postuloj de la Marksa Koncepto, sed ĝi devas esti studata ankaŭ de ĉiu E-isto interesata pri la dialektiko de la patro de Eŭropa Socialismo.

Pri metado en E-an ortografion de propraj nomoj ni diru, ke Spensa, Haksli nur tre malprecize redonas Spencer, Huxley. Kont (Comte) povus esti mislegata kiel eraro por la senŝanĝa Kant. Se oni nepre volas E-igi proprajn nomojn, oni almenaŭ atente studi kiel bazon pjn. 88/92 de "La Originala Verkaro de Zam." (Pri la Alfabeto.) Mankas noto pri "sensualism".

(Robo.)

"The International Good Templar" contains a regular column in Esperanto, edited by T. Honeyman, 61 Peel St., Partick, Glasgow. Over 1,000 Good Templars in Sweden are members of the Esperanto section.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA.

Melbourne Esperanto Club.—Wednesdays, 8 p.m., Australian Church Hall, Russell-st., Melb. Mr. R. Rawson, 169 Exhibition-st.

Melbourne Esperanto Society.—Tuesdays, 8 p.m., Scots Church Hall, 97 Russell-st., Melb. Secretary, Miss L. Irwin, Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

Coburg Esperanto Club.—Thursdays, 8 p.m., Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Secretary, Mr. A. Spencer, 48 Munro-st., Coburg.

Sydney Esperanto Society.—Thursdays, 8 p.m., 2nd Floor, Manning Bldg., 449 Pitt-st., Sydney. Secretary, Mr. L. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto Society.—2nd and 4th Tuesdays in each month. State Service Union Room, 59a Elizabeth-st. Secretary and president, Mr. L. Parry.

Adelaide Esperanto Club.—Thursdays, 7.45 p.m., Y.M.C.A. Bldg., Hindmarsh Square, Adelaide. Secretary, Mr. F. Droop, 13 Chatsworth-grove, Toorak Gardens.

Westralian Esperanto Society (Perth).—Meets every week. Secretary, Mr. D. Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth.

New Zealand Esperanto Association.—Headquarters of the international language movement in New Zealand. Patrons: Sir George Fowlds, C.B.E., Auckland, and Prof. J. Macmillan Brown, Christchurch, Chancellor of the New Zealand University. President Mr. W. L. Edmanson; Vice-pres; Mr. C. Brandon, Auckland, Mr. H. E. Facer, Palmerston North, Mr. A. Dewar, Masterton, and Mr. L. A. Eford, Christchurch. Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Wellington; Hon Secretary, Mr. Wm. H. King (Room 106 G.P.O. Blds., Wellington, C.I.). Operations: Propagating Esperanto; arranging annual congresses; conduct of correspondence courses; supplying information etc.

New Zealand.

Wellington Esperanto Club.—Mardoj, 8 p.m., Y.M.C.A., Willis-st., Wellington. Prez., s-ro Vernon Leck; vicprez., f-ino Coralie Smythson, D.B.E.A.; kasisto, s-ro L. E. Dust, D.B.E.A.; sek-io, C. T. Cooch, Box 390, Wellington.

Auckland Esperanto Society.—Mondays, 7.30 p.m., New Church Hall, Newton-rd. Communications president, Mr. J. Russell, 2 Pukenui-rd., Epsom.

En la Estonteco.

La ĵurnaloj de la estonteco ne plenpakos la kolonojn, raportante pri ŝteloj, drinkadoj, militoj, industriaj disputoj kaj paroloj politikaj. Scienco, Arto, kaj Literaturo prenos ĉefrangon. Nur la paĝojn pure literaturajn oni presigos en la nacia lingvo. La novaĵinformoj presiĝos en la interlingvo. Nuntempe miloj da homoj sentas intereson legi, kiun faris aliaj en la kampoj arta kaj scienca, sed estonte milionoj ĝuos aktivan partoprenadon. Ĉi tiuj milionoj avidos informojn pri eltrovaĵoj de homoj laborantaj simil-fake sur la tuta tero. Landlimoj ne plu baros, kaj izoleco estos for.

La presmekaniko estos forte pliefikigita. Novaĵoj flugos per radio kaj estos literstampitaj sur metalon, per kiu oni povos ilin presi. Neniu linotipmaŝino necesos. La samtempigita rubandmaŝino jam heroldas tiun evoluadon.

Per la interlingvo estos eble, sendi ĉiajn novaĵojn al unucentra ricev-stacio, de kiu oni retranssendos ilin ĉien, aŭ al tri, kvar aŭ kvin tiaj stacioj, se oni preferos tion. Okazaĵoj de mondgravo estos sendataj en konciza netformo ne bezonanta reverkon. Malaperos multo de la nune teda subredakta laboro

Ĉiuj sciencaj kaj teknikaj libroj estos verkataj en la interlingvo. Dum intera periodo, antaŭ ol ĉiu plene posedos la helplingvon, kelkaj libroj povos esti presataj en la nacia lingvo de siaj aŭtoroj kaj publikigitaj samtempe kun interlingva traduko. Scienculoj tiel forte bezonas interfakan kunlaboron, ke ili volonte vestos siajn pensojn en la lingvo komuna por iliaj internaciaj kolegoj, simile kiel ili faris kun la Latina. Bazita sur Latino (1) la interlingvo ne estos malfacila por ili.

La interlingvo akcelos sciencan reserĉon kaj pliiĝi rapidon de internaciaj komunikoj. Oni uzos ĝin por alilandaj korespondo, konferencoj kaj radio

Probable post 50 (eble post nur 30) jaroj ĉiuj ŝvitos, lernante la interlingvon. Homoj akiros ĝin en la infanpaŝa aĝo, flank-al-flanke kun la patra lingvo. La lernejoj estos tute dulingvaj. La interlingvo kaj la nacia estos uzataj por instrui la infanojn, kiuj, antaŭ ol ekfrekventi la lernejon, parolos ambaŭ. Por aritmetiko, geometrio, matematiko, astronomio, hemio, geografiaj kaj historio de fremdaj landoj, la interlingvo estos la instruilo; la naciaj oni uzos por la literaturo, historio kaj geografia de la propra lando

La interlingvo ludos sian parton en la konstruado de la estonta mondo, en kiu ĉiuj popoloj estos unu—popolo kulturriĉa kaj ankora, civilizita super nia nuna konceptipovo, parolanta komunan lingvon kaj ligita de komunaj interesoj—mondo en kiu la militoj de klasoj kaj nacioj estos malaperintaj por ĉiam.

(1) La aŭtorino, S. Pankhurst, estas Interlingvano.

(El la lasta ĉapitro de "Delphos": Kegan, Paul, Londono.)

In the Future.

The newspapers of the future will no longer fill their columns with accounts of larceny, intemperance, wars, industrial disputes and speeches of politicians. Science, art and literature will take first place. Only the pages devoted wholly to literature will be printed in the national language. The news will appear in the *Interlanguage*. Where thousands of people are to-day interested in reading of what others have done in art and science, millions will then delight in their actual pursuit. These millions will be eager for news of the discoveries of people engaged in similar activities all over the globe. The frontiers will form no barrier and insularity will be no more.

The mechanism of the Press will be revolutionized. The news will be transmitted by wireless telegraphy, and its impression recorded on metal from which it may be printed. No typesetting machine will be required. The synchronised tape-machine is the precursor of this development.

By using the *Interlanguage* it will be possible to send all news to one world receiving-station, for transmission everywhere; or to three, four, or five such stations, if preferred. Events of universal importance will be conveyed in concise words that will require no sub-editing. Much of to-day's tedious sub-editing will disappear.

All scientific and technical books will be written in the *Interlanguage*. During an interim period, before everyone has a familiar knowledge of it, some works may be written in the native tongues of their authors and published simultaneously with an *Interlanguage* translation. Scientists have such vital need of co-operation that they will gladly clothe their thoughts in the language that will be common to their international fraternity, just as they did of old in Latin. Based on Latin (1), the main vehicle of their existing nomenclature, the *Interlanguage* will prove no difficult barrier to them.

Interlanguage will accelerate scientific research and increase the speed of international communications. It will be used for foreign correspondence and conferences, and for broadcasting

Probably fifty (perhaps even thirty) years hence, no one will be troubled by learning the *Interlanguage*. It will be acquired at the toddling age, side by side with the mother tongue.

The schools will be wholly bi-lingual. The *Interlanguage* and the native language will be used in teaching children, who will enter school with a familiar-speaking knowledge of both. For arithmetic, geometry, mathematics, astronomy, chemistry, the geography and history of foreign countries, the *Interlanguage* will be the vehicle of instruction, the national language being employed for the literature, history and geography of the native land

The *Interlanguage* will play its part in the making of the future, in which the peoples of the world shall be one-people: a people cultured and kind, and civilised beyond today's conception, speaking a common language, bound by common interests, when the wars of class and of nations shall be no more.

(1) The authoress, S. Pankhurst, is an Interlinguist.

(From the last chapter of "Delphos," Kegan, Paul, London.)

Psychic Esperanto League.—Mr. A. W. Thomson, or "Avoto," founder of the Scouts' Esperanto League, is wishful of forming also a body of Esperantist Psychics. A fine letter from him on the subject appeared in the "Psychic News," London, the largest spiritualist newspaper. Any Australian Esp. Psychics are invited to write to him, using his monomark address—BM/Avoto, London, WC1.

Thanks to:—Mr. Barnett, 10/-, June, '35; Mr. Haccou, 5/-, Oct., '34; Miss Hannaford, 4/6, Sept., '35; Auckland Esp. Soc., 5/-, May, '35, (adv.) May, '35; Miss Remington, 4/6, June, '35.

Esperanto radio lessons continue from 3LO, Melb., every other Sat. at 6.15 p.m. See programs in the Radio magazines and dailies. Particulars also from R. Rawson, c/o 3LO.